


# IL POPOLO CINIO

中國報道

8

1985





*Pramado*

Foto de **SUN JONGSJUE**

## Enhavo

<b>Medicino:</b> Ĉinio batalas kontraŭ kancerroj . . . . .	2
<b>Esperanto:</b>	
La E-movado de la Interna Mongolio en disvolviĝo . . . . .	17
Multlingveco kaj kultura evoluo en evoluantaj landoj . . . . .	19
[Sur nia librobreto] Pli ampleksan albumon pri Zamenhof! . . . . .	22
[Por komencantoj] Geedziĝa festo . . . . .	23
Esp-novaĵoj . . . . .	24
<b>Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (8):</b> Agrikulturo de la altebenajo . . . . .	54
<b>Kampara ekonomio:</b> Familiaj kultivejoj . . . . .	6
<b>Malfermitaj urboj:</b> Ŝanhajo — granda urbo en la mondo . . . . .	12
<b>Lingvo:</b> Magiaĵo de l' vortoj . . . . .	45
<b>Scienco:</b> Esploro pri granda dezerto (Fotoserio) . . . . .	60
<b>Literaturo:</b>	
En pluvfadenetoj (Mikronovelo) . . . . .	46
La lasta flugo (Poemo) . . . . .	50
<b>Arto:</b> Pentraĵoj de Jiĝjun-aj kamparanoj . . . . .	36
<b>Sporto:</b> Post la internacia gimnastika turniro . . . . .	26
<b>Por via sano:</b> Cerbosaniga ekzercado . . . . .	65
<b>Socia vivo:</b>	
Kiel Ĉinio traktas junajn krimulojn? . . . . .	41
La Lanterna Festo en antikva ĉefurbo . . . . .	7
<b>Nunaj ĉinoj:</b> Matematikistino, dommastrino kaj "sekretariino" . . . . .	38
<b>Enciklopedieto de Ĉinio:</b> Budhismo en Ĉinio . . . . .	48
<b>Vojaĝo tra Ĉinio:</b> Uŝji, perlo ĉe Tajhu-lago . . . . .	30
<b>Kaptado de besto:</b> Sovaĝa kamelo en Ĉinio . . . . .	29
<b>Internacia problemo:</b> Alte tenu la standardon de paco kaj disvolvo . . . . .	63
<b>Ĉinlingva kurso</b> . . . . .	68
<b>Kurantaj aferoj</b> . . . . .	51
<b>Sur la kovrilo:</b> Du drakoj ludas perlon (Bonvolu legi la artikolon "La Lanterna Festo en Antikva Ĉef- urbo" en tiu ĉi numero.)	Foto de <b>SUN ŜUMING</b>
<b>Sur la dorskovrilo:</b> La pitoreska Luŝan-monto (Ĉinstila Pentraĵo)	de <b>ĜENG NAJĜUANG</b>
<b>Interne de la kovrilo:</b> Pramado	Foto de <b>SUN JONGŜJUE</b>
<b>Interne de la dorskovrilo:</b> Fotoj faritaj de E-istoj	
1. Kanguruoj de Aŭstralio   2. Kanbero	de <b>IRENA CZITRONYI</b> (Aŭstralio)

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00	
Aŭstralio	\$A	9.00	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00
Britio	£	5.00	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00			
			Italio	Lit	11 000.00	Portugaliao	Esc.	700.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	2.80	US\$	4.00

# ĈINIO BATALAS KONTRAŬ KANCEROJ



*Vicprofesorino Ŭang Kajhŭa (la dua de dekstre) de Sĵamen-universitato analizas kune kun sciencistoj de la Kontraŭkancera Instituto la tri ĉelajn lineojn de stomaka kancero en malsamaj gradoj.*

En 1958 fondiĝis en Pekino la Tumora Hospitalo sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj, la unua tiaspeca hospitalo en Ĉinio. Pasis pli ol 20 jaroj. Ĉinio nun havas 17 tumorajn hospitalojn kaj tumorologiajn institutojn. La Tumora Hospitalo sub la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj jam fariĝis centro kun diversaj avangardaj ekipaĵoj kaj spertaj fakuloj por preventi, kuraci kaj esplori kancerajn kaj akiris bonajn sukcesojn en kuracado kaj esplorado.

Laŭ la internacia normo de kvin-jara daŭra vivado post kuracado, la progreson de Ĉinio montris la jena statistiko:

## PROCENTOJ DE RESANIGITOJ

(60-aj jaroj) (1977-1983)

Stomaka kancero	20%	30-40%
Ezofaga kancero	25%	35-40%
Pulma kancero	10%	15-40%
Mama kancero	40%	50-70%
Nazofaringa kancero	30%	35-50%
Hepata kancero	2.6%	10-20%

## OKULFRAPA TUMOROLOGIA ESPLORADO

Ĉinio komencis esplori tumoran epidemiologion en la 70-aj jaroj. Post etskala enketo pri mal-

saniga kaŭzo en diversaj lokoj, la ŝtato mobilizis pli ol 600 000 homojn kaj dediĉis 10 jarojn al ĝenerala enketo pri pli ol 2 100 gubernioj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj por 2.5 miliardoj da homfojoj kaj tiel konis la leĝon de dislokiĝo de la 14 plej oftaj malignaj tumoroj en loĝantoj kaj regionoj de Ĉinio.


La ezofaga kancero estas tumoroj plej ofta en Ĉinio. La mortoprocentaĵo de la suferantoj de ezofaga, stomaka kaj hepata kanceraj konsistigas pli ol 60% de la mortintoj de la ĉiuspecaj kanceraj. La observado de pli ol dek jaroj montris, ke nitroza kombinaĵo en homa korpo estas malsaniga faktoro de ezofaga kancero kaj ŝimo en manĝaĵo akcelas la formiĝon de nitrosamino kaj ĝia antaŭvenanto kaj ludas aktivan rolon. Tiu trovo puŝas la esploron pri ezofaga kancero al nova stadio. Poste, aplikante la prognozan metodon de ezofaga citologio, oni faris grandskalan kontrolon. Progresis la frua prognozo kaj altiĝis la kurac-efiko sur prekancerozo.

Koncerne alian oftan tumoron, nazofaringan kanceron, oni ankoraŭ ne povas difini ĝian kaŭzon, tamen la absorba enzim-imuniga metodo ellaborita surbaze de eltrovo de EB-viruso faciligis la fruan prognozon de tia kancero. Per nud-okula observado al la rezulto de kontrolo de sero oni jam povas trovi la danĝeron kaŝitan en la homa korpo 8-30 monatojn pli frue ol la apero de kancera ĉelo. Tiu sukceso ebligas al pli ol 90% de la fruaj suferantoj de nazofaringa kancero daŭre vivi kvin jarojn.


La fruktoj de epidemiologia esplorado montras, ke preventado estas ebla. La afekcia procezo de kancero trapasas du-tri ĝis dek jarojn. En tiu tempo oni povas apliki multajn pozitivajn detenajn rimedojn, ekz. forigi kancerigajn faktorojn en la medio kaj redukti kancerigan eblecon facile por la loĝantoj. Krome, plibonigi la strukturon de manĝaĵoj, provizi la homan korpon per necesaj proteinoj, vitaminoj, mikroelementoj ktp. povas deturni kancerajn ĉelojn kaj ekstermi la kanceron en ĝermado.

## AŬRORO DE BIOMEDICINA TEKNIKO

Depost kiam biotekniko, precipe genotekniko, estis enkondukitaj en kanceran esploron en la 70-aj jaroj, la kontraŭkancera esplorado en la mondo prezentis agrablan perspektivon. La homaj ĉeloj havas 50 000 ĝis 100 000 genojn, el kiuj eĉ unu geno nenormala povas esti kanceron. Genotekniko celas koni, kiu geno anormaliĝis, kaj



*Mano kun tumoroj antaŭ kuracado*



*La mano kuracita*

bonigi denaske manko-havan genon per tekniko rekombini DNA por renormaligi la kancerigan genon. Tio estas tute nova kampo. Nun la genogreftado estas en eksperimentado, sed la kontraŭkanceraj medikamentoj faritaj per genotekniko, kiaj homa insulino, kreska hormono kaj interfero, jam estas klinike aplikataj.

Ĉinio bone progresis en tiu kampo. La nove kaj sukcese farita homa alta transiĝa kancera lineo en vitro montris novan vojon por sisteme esplori biologiajn trajtojn de homa maligna tumoroj en vitro, malkaŝi infiltradon kaj transiĝan meĥanisman de homa tumoroj kaj esplori rimedon por klinika kuracado. En la pasintaj dek jaroj Ĉinio jam kulturis pli ol dek specojn de ĉelaj lineoj de homa kancero longe kulturatajn en vitro, inter kiuj tiuj de hepata, ezofaga kaj stomaka kan-

ceroj jam estis uzataj en genodisigo kaj preparado de monoklona antikorpo kontraŭ tumora asocia antigeno.

Monoklona antikorpo povas precize trovi en la multnombraj ĉeloj de homa korpo specifan celon — bakterion, specialan sangoĉelon kaj kanceran ĉelon — kaj direkti atakon nur al ili. Ĉinio jam akiris pli ol dek specojn de monoklona antikorpo.


Interferajo estas grava proteino por reguligi la ĉelan funkcion kaj havas bonan kurac-efikon sur malignajn tumorojn kaj etan malbonan efikon. Sed ĝi ekstraktita el homa sango estas tro kara pro sia malmultnombreco. La genoteknika klono de la homa interferajo A farita de Ĉinio estis uzata en interferaja produktado, kio akiris rimarkindan progreson. La interferajo kaj aliaj biologiaj medikamentoj produktataj de Ĉinio estos liverataj al la merkato post unu aŭ du jaroj.

## LA ĈINA KAJ OKCIDENTA MEDICINOJ KOMBINITAJ POR KURACI KANCERON

Kuracado de kancero per la ĉina kaj okcidenta medicinoj kombinitaj estas terapio iniciatita de Ĉinio.

Ĉinmedicinaj drogoj montras neignoreblecon en kontraŭkancera esplorado. En 1966 oni disigis de angelika kaj aloa pilolo efikan substanceton — indirubinon — kiu havas grandan kurac-efikon sur malignan tumoron de sangoforma sistemo — kronika mjelocita leŭkemio. Post sistemaj farmakologia kaj toksologia eksperimentado, oni resanigis per indirubino 87% de la suferantoj. Alia vegetala medikamento “haringtonino kaj homoharingtonino”, kune kun aliaj ĉinmedicinaj drogherboj, povas mildigi la malsanon de 80% de la leŭkemiuloj. Krom granda kvanto da soldrogaj medikamentoj, ankaŭ injektaĵoj preparitaj el la efikaj elementoj ekstraktitaj el ĉinmedicinaj dro-

*Paciento kontrolata per X-radia transsekcatoro*





*La veterana ĉin-medicina kuracisto Sun Bingjan faras diagnozon por kancerulo.*

goj kaj medikamentoj kombinitaj el ĉinmedicinaj drogoj jam estas aplikataj en klinika kuracado. El la pli ol 60 specoj de kontraŭkanceraj medikamentoj nemalmultaj estas ĉinmedicinaj medikamentoj.

Koriokancero estas ginekologia maligna tumor de embriotrofa ĉelo kaj antaŭe ofte kaŭzis morton en duonjaro post la malsaniĝo. De post 1958 la Ĉefurba Hospitalo de Pekino kuracis proksimume mil pacientojn per litosperma radiko, 6-merkaptopurino kaj aliaj, provante grandozan medikamentan kaj kemian terapion, ke la morto-procentaĵo reduktiĝis de 89% al 17%. Saviĝis eĉ malfruaj pacientoj suferantaj de disvastiĝo de kancero al pulmo, encefalo, hepato kaj reno. La kuracitoj vivis pli ol kvin jarojn kaj nemalmultaj el ili eĉ pli ol 20 jarojn. Plejparto el la pli ol 200 junaj virinoj post elhospitaliĝo povas denove gravediĝi kaj la infanoj naskitaj de ili kreskas normale.

Ankaŭ la ĉinmedicinaj principoj fortigi la rezist-kapablon kaj viv-energion de pacientoj, akceli cirkuladon de sango kaj elimini ĝian stagnadon, kaj forigi varmon, tokson kaj tumoron estas atentataj en preventado kaj kuracado de kanceraj.

### **SUKCESO EN KURACADO DE HEPATA KANCERO**

Primara hepata kancero estas "nekuracebla". En la 40-aj jaroj aperis biokemia prognozo, ultrasona ekzameno, radia nukleina balaado kaj aliaj ekzamenaj metodoj por hepato. Sed nur post kiam la tumor kreskis ĝis certa grandeco, oni povis trovi ĝin.

En la 70-aj jaroj iuj landoj faris fruan prognozon al hepata kancero per determinado de AFP. Ĉinaj medicinistoj trovis tumoron kun grandeco de arakido en operacio de fruaj pacientoj konstatitaj per la metodo.

Tiel, multaj fruaj malsanuloj de hepata kancero sen simptomo povas esti trovitaj per la metodo. Dank' al tio la procentaĵo de 5-jara daŭra vivado de hepat-kanceruloj leviĝis de 2.6% en la 60-aj jaroj al 20.6%. Tio estas la monda rekordo ĝis nun konata.

Ankaŭ la malsaniga meĥanismo de hepata kancero fariĝis pli kaj pli klara. En la kancera esplorado Ĉinio unuafoje trovis genon de hepata kancero en primara hepata kancero kaj ĝiaj kulturitaj ĉeloj. La ĝisnuna esplorado montris, ke la primara hepata kancero en Ĉinio rilatas rekte kun B-hepatita viruso. Laŭ 6-jara perspektiva observado al 15 000 pacientoj, la nombro de hepat-kanceruloj trafitaj de B-hepatita viruso superis tiun de pacientoj ne trafitaj de tia viruso je pli-ol-200-oblo. Poluciitaj manĝaĵo, trinkakvo, injektilo kaj aliaj povas esti komunikantoj de B-hepatita viruso. Manĝi ŝiman grenon kun flava aspergilo estas ĉefa kaŭzo de hepata kancero. Tiu esploro ŝanĝis la tradician konon pri kaŭzo de hepata kancero. Nun iuj sciencistoj esploras imunologian preventadon kontraŭ hepata kancero.

La esplorado de hepata kancero en Ĉinio nun estas en malekula-biologia stadio. La sukcesa eksperimento pri B-hepatita vakcino en laboratorio, preparado kaj uzo de tia vakcino havas epokfaran signifon. Ĉinio jam akiris sukceson en eksperimenta produktado de B-hepatita vakcino per genetika tekniko — tekniko rekombini DNA. Ĝia plua disvolviĝo malfermos novan vojon por preventi kaj kuraci heptan kanceron.



# FAMILIAJ KULTIVEJOJ

de LEJ JUŠIN

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, multaj ŝtataj kultivejoj aperis sinsekve en la Nordoriento, Nordokcidento, Sudo kaj Sudokcidento de Ĉinio. Ili estas agrikulturaj entreprenoj investitaj de la ŝtato, kaj la kultivantoj estas ĉefe demobilizitaj militistoj kaj la ceteraj estas junuloj el urboj kaj transmigrintoj. Nun Ĉinio havas pli ol 2 000 ŝtatajn kultivejojn. Ili ne nur liveris al la ŝtato grandan kvanton da greno, porindustriaj materialoj, eksportaj komercaĵoj ktp, sed ankaŭ donis al la ĉirkaŭaj kamparanoj ekzemplojn kaj servojn kaj akcelis la prosperon de la kampara ekonomio.

En la lastaj jaroj, sekve de la reformado al la ekonomia sistemo en la lando, la ŝtataj kultivejoj alprenis diversajn novajn metodojn surbaze de la laŭkontrakta respondeca produkta kaj administra sistemo de la agrikulturo kaj brutobredado. La plej ofta metodo estas starigi familian kultivejon. Ĝis la fino de la pasinta jaro, ekzistis sume 634 200 diversformaj familiaj kultivejoj, kiuj entreprenas fiŝbredadon, grenproduktadon aŭ tekultivadon. En la familiaj kultivejoj oni laboras aŭ per modernaj maŝinoj aŭ per brutoj. Unuvorte, oni laboras laŭ la konkretaj kondiĉoj de la loko.

Sub la tutpopola posedsistemo, la familiaj kultivejoj farmas teron de la ŝtataj kultivejoj, prenas

sur sin taskon laŭ kontrakto, plenumas la taskon per la forto de la familio, liveras al la ŝtataj kultivejoj difinitan kvanton da produktaĵoj kaj mem prirespondis profiton kaj perdon. Ili estas ekonomiaj unuoj neapartigeblaj de la ŝtataj kultivejoj. Sub la direkto de la ŝtata planizita ekonomio, la produktado de la familiaj kultivejoj devas obei al la plano de la ŝtataj kultivejoj, ĉiuj iliaj laborspecoj estas kroĉitaj al la servoj al la tuta procedo de la produktado de la ŝtataj kultivejoj. Krom la kapitalo kolektita de ili mem kaj prunteprenita de banko, la cetera sumo de la kapitalo venas de ŝtataj kultivejoj, iliaj produktaĵoj estas aĉetitaj, prilaboritaj, konservitaj, transportitaj kaj venditaj de la ŝtataj kultivejoj. Pro tio, la ŝtataj kaj familiaj kultivejoj ne povas disiĝi unuj de la aliaj. La familiaj kul-

tivejoj estas grava konsistiga parto de la ŝtataj kultivejoj.

La familiaj kultivejoj observas la distribuon principon "sufiĉe kontingenti al la ŝtato kaj la entrepreno, kaj preni al si la restaĵon". Tiu principo rompis la katenon de la klasigita salajrosistemo, kaj la enspezo de la laboristoj ĝenerale altiĝis je 30-50%, kaj iuj eĉ enspezis kelkoble pli multe. Ankaŭ iliaj familianoj povas partopreni en la produktado, pro tio la familia enspezo senĉese altiĝas.

Tjan Gŭangŝeng, 43-jara laboristo de la kultivejo Jaĉjŭe-lago de Bojang-gubernio en Ĝjangŝj-provinco, kaj liaj 4 familianoj meznombro ĉiu lukris en 1977 nur 150 jŭan-ojn (2.8 jŭan-oj egalas al unu usona dolaro). En 1982, lia familio farmis de la kul-

(Daŭrigo sur p. 66)

*Membroj de familia kultivejo en Ŝanhajo laboras en kotonkampoj.*





ĜANG ĈINGĜEN:

# LA LANTERNA FESTO EN ANTIĤVA ĈEFURBO



*Strato en la Lanterna Festo*

En ĉina klasika romano mi legis belan priskribon pri la Lanterna Festo, kiu okazas la 15-an de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro. Kaj ĉi-jare en la urbo Kajfeng de Henan-provinco mi propraokule vidis ravan spektaklon de la Lanterna Festo.

Kiam nokto vualis Kajfeng, la prosperan ĉefurbon de sep dinastioj, super kelke da ĉefaj stratoj tuj eklumis sennombraj koloraj lanternoj. Urbanoj eksvarmis sur la stratoj por rigardi diverskolorajn lanternojn. Mi promenis en lanterna maro kaj absorbiĝis de ĝi.

La festaj lanternoj, en kiuj montriĝas artoj de pentrado, papertondado, plektado kaj brodado, estas faritaj el bambuo, ligno, liano, pajlo, bestkorno, metalo kaj sateno. Ili prenas kiel sian enhavon antikvajn pejzaĝojn, mitojn, teatrajn rolojn, modernajn konstruaĵojn kaj birdojn, insektojn kaj florojn. La lanternoj belaspektaj kaj turniĝantaj karakteriziĝis plejparte per sono, lumo kaj elektro en kombino.

Historiaj notoj diras, ke jam en la Okcidenta Han-dinastio (206

a.K. — 24 p.K.) oni komencis fari kolorajn lanternojn por apreci. Tiam ĉiujare en la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro la imperiestraj parencoj iluminis siajn loĝejon kaj aranĝis festenon, kaj la ordinaraĵoj popolanoj gaje festis la tagon. En Tang-dinastio (618-907 p.K.) furoris koloraj lanternoj, inter kiuj estis eĉ 7 metrojn alta lanterna rado ornamita per silkaĵoj, 5 metrojn alta lanterna turo kaj 3 metrojn alta lanterna arbo. Antikva libro priskribas, ke kiel suno la lanternoj prilumis ĉiujn stratojn kaj templojn, ke ĉiuj rigardis ilin nokte kaj ke ĉevaloj kaj ĉaroj obstrukcis la stratojn kaj oni devis fari kelkdek malfacilajn paŝojn. En Song-dinastio (960-1279 p. K.) la imperiestroj persone rigardis lanternojn kaj regalis popolanojn per vino por montri, ke ili festas kune kun ordinaruloj. Ekde la 14-a jarcento la spektaklo de la Lanterna Festo fariĝis des pli impona.

Nun la tradicia moro de la ĉina popolo ankoraŭ daŭras en multaj lokoj de Ĉinio. Senescepte en la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Hangĝoŭ festas

la Lanternan Feston kun loka koloro. Hodiaŭ la Lanterna Festo ne nur heredis la tradiciojn, sed ankaŭ multe riĉiĝis je nova enhavo.

Ĉi-jare en Kajfeng estis kvar eksponejoj de lanternoj, kiuj etendiĝis pli ol dek kilometrojn. La lanternaro pri antikva arkitekturo super la placo "Tambura Turo" allogis rigardantojn per sia originaleco. La grandioza kaj impona lanternaro en arkitektura stilo de Baŭĝin-turo de Song-dinastio vidigis la majestecon de antikvaj konstruoj. Kun floroj kaj arboj ĉe lageto kiel fono ĝiaj ĝardeno, palacaj domoj kaj kioskoj estis tre ravaj.

Drak-lanterno akompanas ĉiun lanternan feston en Kajfeng. En la strato Ĝongŝan giganta drak-lanterno kun ruĝe brilantaj skvamoj kaj levita kapo moviĝis supren spirale ĉirkaŭ alta pagodo. La lanterno havis longon de 37 metroj kaj diametron de 90 centimetroj kaj estis farita el proksimume 100 bambuaj ringoj. Ĝia buŝo, 2 metrojn larĝa, elŝprucigis "fajron". Ĝiaj gigantaj okuloj fulmis. Pli ol 200 elektraj lampoj lumis sub ĝiaj skvamoj ruĝaj kaj

flavaj. Ili brilis laŭvice de malsupre supren kaj ĝiaj kapo kaj vosto skuiĝis senĉese jen dekstren, jen maldekstren. En tamburado kaj gongado ĝi dancis, kvazaŭ flugante ĉielen.

La romantikaj lanternoj kun porinfanaj desegnoj "Simieto Vizitas Lernejon", "Kateto Hokas Fiŝon" kaj "Eltiri Rafanon", la modelo-lanterno "Kanto pri la Antikva Ĉefurbo Kajfeng" kun sono kaj lumo, la komika lanterno kun portreto de Chaplin, la lotusaj lanternoj kaj la lanternoj kun desegnitaj figuroj de homoj kaj bestoj, ĉiuj havas siajn proprajn karakterizaĵojn. Ĉina legendo diras, ke lotusa lanterno de budhisma templo helpis disigitajn patrinojn kaj filojn denove renkontiĝi kaj la lanterno kun desegnaĵo estis uzata de Ĉang'e, belulino sur la luno, por prilumi la homan mondon. La lanternoj eksponataj ĉi-foje havis formon de kiosko, kun ĉirkaŭfermaĵo ornamita per duoblaj malhelaj desegnoj, kiu aspektis elegante. Lumigite, la

ĉirkaŭfermaĵo kun desegnitaj homfiguroj aŭtomate turniĝis senĉese, kio vivigis la homfigurojn kaj pejzaĝojn.

En la eksponejo Longting la lanterno "Hongĉjaŭ en Printempo" prezentis la prosperon de Kajfeng, la ĉefurbo de Songdinastio. Sur ĝia malvasta fundo videblis kiosko, turo, plezurboato, virino, vojaĝanto, kamelo, hundo kaj ĉevalo, kaj krome, ankaŭ tetrinkejo, drinkejo, lombardejo, rizvendejo, farejo de ceramikaĵoj ktp. La lanterno surhavas pli ol 200 diversspozajn homfigurojn.

Subite aŭdiĝis de proksime serena ridado. Mi rigardis tien kaj vidis, ke svingiĝas la lanterno "Karmo Englutas Globeton". La karmo kvazaŭ naĝis en akvo, spirante per la brankoj kaj produktante buntajn akvovezikojn, kio ridigis la infanojn.

La plej alta lanterno estis tiu en formo de 12-etaĝa pagodo. Koloraj lampoj prilumis la levi-

ĝantaj tegmentrandojn de la plej malsupraj du etaĝoj. Kaj ĉe la fenestroj de la supraj dek etaĝoj lumis lampo. En la plej malsupra etaĝo estis niĉo kun fumanta incenso, kiu impresis kiel budhisma templo.

La eksponejo Nangŭan estis rivero de lanternoj kaj ankaŭ fenestro de ekonomiaj informoj. La lanterno "Terglobo", farita de la Kajfeng-a Maŝinfabriko, koniĝis, ke ĝiaj produktaĵoj trovis debiton tra la lando kaj ricevis laŭdon de la uzantoj. La persik-lanterno, pom-lanterno, oranĝ-lanterno, faritaj de la Kajfeng-a Fruktokompanio, estis kolorfreŝaj kaj versimilaj. "Granda Pando", lanterno farita de farmacia fabriko, kun rideto staris antaŭ la publiko firme tenante laŭtparolilon kaj markotabulon, kvazaŭ ĝi estus aktiva eksponisto.

Inter la rigardantoj estis ne nur urbanoj, sed ankaŭ kamparanoj de la antaŭurbo. Iuj eĉ portis lanternojn faritajn de ili mem. Iu kamparano kunportis lanternon kun bildoj pri la nova fizionomio de sia vilaĝo. Lia lanterno interesis multajn rigardantojn. En la bildo pri printempa plugado videblis, ke kamparanoj vipas ĉevalojn por plugi teron. En la bildo pri falĉado videblis, ke oni falĉas maturajn grenplantojn. En la bildo pri riĉa rikolto videblis grentenejoj kaj amasigitaj fruktoj kaj legomoj, ĉe kio oni kvazaŭ flaris bonodoron de rikoltitaj fruktoj.

Estis jam profunda nokto. Oni tamen ne sentis lacon. La urbo estis tia, kian priskribis antikva poeto en sia verko:

*Festa lanternaro tre similas  
ruĝ-arbaron,*

*Gaja tamburado jam anoncas  
primaveron.*

*Lanternoj en la festotago*






*Rigardantoj de lanternoj*



*La Lanterna Festo en nokto*

Fotoj de JAN ĜIN




*Leonaj lanternoj* Foto de SJANG ĜJUN





*La lanterno "Baŭĝin-pavilono" en antikva arkitektura stilo*



*La lanterno "Paŝtisteto sur Bovo"*



*Strato laŭ Hŭangpu-rivero*

MALFERMITAJ URBOJ

# ŜANHAJO—GRANDA URBO EN LA MONDO

de ŬEJ LJAŬ

Fotoj de ĈUN GENG

*La apartamenta domo Jandang konstruita per investado de kompanioj de Ŝanhajo kaj Hongkong*

*Muntejo de fabriko administrata kune de Ĉinio kaj Usono*



*La kontenera kajo  
de la Ŝanhaja  
Haveno*





Kiam la ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang inspektis Ŝanhajon, li figure esprimis per “du malfermitaj ventumiloj kaj unu pivoto” la favorajn kondiĉojn de Ŝanhajo en malfermo de la pordo al aliaj lokoj de Ĉinio kaj la eksterlando.

Ŝanhajo situas okcidente de la Pacifika Oceano, en la mezo de la orienta marborda linio de Ĉinio kaj ĉe la enfluejo de Jangziverivero. Ĝi havas areon de 6 185 kvadrataj km. kaj 11.8 milionojn da loĝantoj kaj estas la plej gran-


da urbo de Ĉinio. La ekonomia regiono de la delto de Jangziverivero kun Ŝanhajo kiel la centro konsistas el naŭ urboj kaj sesdek gubernioj de Ĝjangsu- kaj Ĝeĝjang-provincoj. Ĝi estas unu el la plej riĉaj regionoj de la lando.

*Parto de la Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala Kompanio*





*Tutmonde vendataj lanvestoj produktitaj de la Ŝanhaja Unuigita Limigita Kompanio de Lanteksado*



*Modelo pri konstruado de la ekonomia distrikto Hongĉajŭ*

El la du malfermitaj ventumiloj unu disradias de la ekonomia regiono al la landinterno kaj la alia al la eksterlando tra la Pacifika Oceano. Ŝanhajo en la centro de la du ventumiloj rolas kiel pivoto.

Ŝanhajo estas la plej granda industria urbo de Ĉinio kaj ludas gravan rolon en la ekonomio, scienco, tekniko kaj ekstera komerco de Ĉinio. Ĝia totala produktovaloro de industrio estas okono de tiu de la tuta lando. En

1984 ĝi atingis 76 650 milionojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas unu usonan dolaron). La urbo havas industriojn metalurgian, maŝinan, ŝipkonstruan, kemian, elektronan, mezurilan, malpezan kaj tekstilan kiel la ĉefajn.

Ŝanhajo estas unu el la gravaj ŝtalaj bazoj de Ĉinio. En 1984 ĝia ŝtala produktokvanto jam atingis 5 490 000 tunojn, Post plenumiĝo de la duperioda konstruado de la Baŭŝan-a Ĝenerala Ŝtala Kompanio en 1990, la totala ŝtala produktokvanto de la urbo povos atingi 6.7 milionojn da tunoj. La granda moderna petrola kaj kemifibra kombinato, la Ŝanhaja Ĝenerala Petrolkemia Fabriko, konstruita en 1979 produktas cent mil tunojn da sinteza fibroj, kiu estas kvinono de la totala produktokvanto de la lando. Ŝanhajo estas ankaŭ centro de ŝipkonstruado, kun konstrua kapablo preskaŭ duone kiom tiu de la tuta lando. Lastatempe oni akcelis la disvolviĝon de novaj industrioj de elektrono, mezurilo, duonkonduktanto, atomo, infraruĝo kaj lasero. Nun Ŝanhajo jam komencis produkti pogranda elektronajn mezurilojn kaj mez-kaj malgrandajn komputilojn.

Ŝanhajo estas ankaŭ grava centro de trafiko al aliaj urboj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La Ŝanhaja Haveno estas la plej granda en la lando. Ĝia jara en- kaj elŝipiga kapablo atingis 101 milionojn da tunoj, kaj per tio ĝi fariĝis unu el la dek grandaj havenoj kun en- kaj elŝipiga kapablo de cent milionoj da tunoj en la mondo. La haveno havas 96 ankrejojn, kie estas konteneraj, lozgrenaj, karbaj kaj mekanizitaj porlignaj kajoj provizitaj per tri specialaj fervojoj por ligi la akvan vojon. En kontenera trafiko, kiel avangarda transporta formo en la mondo, la Ŝanhaja Haveno jam



metis bazon por si. Ĝis nun ĝi jam havas tri ĉefajn liniojn al Aŭstralio, Usono kaj la Okcidenta Eŭropo kaj du branĉajn liniojn al Japanio kaj Hongkong, kaj krome la haveno ankaŭ faras kromokupon por ekstera komerco kun norda Eŭropo, okcidenta Afriko kaj la regiono de la Persa Golfo. Ĉiujare ĝi en- kaj elŝipigas 110 mil normajn kontenerojn. Nun ĝi starigis trafik-komercajn rilatojn kun pli ol 400 havenoj de 160 landoj kaj regionoj. Ĝia en- kaj elŝipiga kapablo por eksportaj varoj estas kvinono de tiu de la tuta lando. Samtempe ĝia kapablo por transigo de varoj senĉese kreskas. Ĝi, la plej granda ĉina varo-transiga haveno, havas rilatojn kun 24 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. En la fino de la nuna jarcento Ŝanhajo havos cent pliajn ankrejojn en nova havenregiono, tiam la jara en- kaj elŝipiga kapablo atingos 180 milionojn da tunoj.

Ŝanhajo ĉe la suda fino de la Pekin-Ŝanhaja Fervojo kaj norda fino de la Ŝanhaj-Hangĝoŭ-a Fervojo estas grava centro por sudnorda trafiko. Ĝi havas 29 aerliniojn al enlandaj urboj, tri liniojn al Tokio, Osaka kaj Nagasaki kaj du liniojn al Hongkong.

Kun la daŭra praktikado de la politiko malfermi ĉemarajn urbojn, Ŝanhajo altiris al si atenton de multaj eksterlandaj komercistoj kaj industriistoj. En la pasinta jaro Ŝanhajo jam akceptis 91 registarajn komercajn delegaciojn kun sume pli ol 500 personoj, el kiuj estis 16 delegacioj gvidataj almenaŭ de vicministroj; tiujare pli ol 6 000 grupoj da eksterlandaj komercistoj vizitis Ŝanhajon je 20 000 personoj. Ĝis decembro de 1984 la magistrato jam sankciis starigon de 46 entreprenoj kune investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj 35 entreprenoj kune administrataj de Ĉinio kaj

aliaj landoj. Krome la Minesota Mineja Manufakturo de Usono kaj ĉinaj elmigrintoj en Japanio funkciigas respektive la Ĉinan Limigitan Kompanion MMM kaj la Hŭajong-an Industrian kaj Komercan Kompanion. En la pasinta jaro Ŝanhajo ricevis 900 milionojn da usonaj dolaroj de eksterlande.

Precipe alloga por en- kaj eksterlandaj komercistoj kaj industriistoj estas tio, ke nun la urbo plibonigas la komercajn kondiĉojn kaj medion de investado. La Ŝanhaja Ĝenerala Ekster-komerca Kompanio faris reformon kaj en 1985 ĝi fariĝis sendependa loka ekster-komerca entrepreno kaj kunlaboranto de aliaj fakaj kompanioj. La nombro de entreprenoj en Ŝanhajo povantaj fari importan kaj eksportan komercon, inkluzive de la supre menciita kaj aliaj nove naskiĝintaj importaj kaj eksportaj kompanioj,

*Respondeculo pri konstruado de la ekonomia distrikto Minhang konigas la lokon al japanaj komercistoj.*



kreskis al 39. La terciara industrio, kiu havas intiman rilaton kun ekstera komerco, rapide disvolviĝas. Ĝi provizas fremdlandajn komercistojn per loko de traktado, restoracio, hotelo, informoj kaj trafikilo.

Cetere, Ŝanhajo intensigas konstruadon de la nova industria kvartalo Minhang kaj la nova distrikto Hongĉjaŭ. Minhang situas 30 km. for de la urbocentro kaj okupas areon de 213 hektaroj. Tie estas ebena tereno kaj facila trafiko. 3 000-tonela ŝipo povas tien veturi. En la loko estas fervoja branĉo kunligita kun la Ŝanhaj-Hangĝoŭ-a Fervojo, kaj per ĝi oni povas vojaĝi al diversaj lokoj de la lando. Minhang estas la unua

satelita urbo de Ŝanhajo, kun relative fortaj industriaj branĉoj. La urbo havas sufiĉe bonajn publik-utilajn konstruaĵojn, kiel elektrejo, traktejo de malpura akvo kaj telefonia substacio. Nun Minhang donis fabrik-konstruajn terenojn al eksterkomercaj entreprenoj kaj tiuj kune investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Hongĉjaŭ estas loko destinita por aktivado de fremduloj. Ĝi najbaras al la urba kvartalo kaj havas areon de 65 hektaroj kaj facilan trafikon. Ĝi provizos fremdlandajn komercistojn kaj venintajn elmigrintajn ĉinojn per oficejo, loĝejo kaj ekipaĵoj por komerco, sporto kaj distro, kaj konstruos tie ankaŭ fremdlandajn konsulejojn.

La turisma afero de Ŝanhajo disvolviĝis en la lasta tempo. La pitoreska Djanŝan-lago baldaŭ malfermiĝos al la turistoj. Ĝi okupas areon de ĉ. 6 660 hektaroj. Ĝi kunligiĝas okcidente kun Tajhu-lago kaj oriente kun Hŭangpu-rivero. Apud la lago nun konstruiĝas konstruaĵaro en stilo priskribita en la ĉina klasika romano "Songŝo en Ruĝa Buduaro". Ĉe la lago konstruiĝos ankaŭ turisma vilaĝo.

La rapida disvolviĝo de Ŝanhajo pli kaj pli akcelas la ekonomian konstruadon de Ĉinio. Ekonomikistoj asertas, ke kun la orienten-translokiĝo de la ekonomia centro de la mondo Ŝanhajo fariĝos unu el la plej gravaj urboj de la mondo en la pacifika regiono en la venontaj 30-50 jaroj.

*Lanaj brodaĵoj de Ŝanhajo vendataj en dekoj da landoj kaj regionoj*



# LA E-MOVADO DE LA INTERNA MONGOLIO EN DISVOLVIĜO

de LI SEN

La Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio situas en la norda parto de Ĉinio. Esperanto enkondukiĝis tien en la 20-aj jaroj. Tiam junulo Jang Lingde konatiĝis kun lernanto de sinjoro Hujucz kaj lernis de li Esperanton. Poste li donacis al Jang Lingde la libron "Tuta Esperanto", kiu estis donita al li de Hujucz kun ties surskribo. De tiam Jang Lingde decidis lerni Esperanton anstataŭ aliajn fremdajn lingvojn. Tial li, ĉefredaktoro de la "Sujĵuan-a Nacia Ĵurnalo", lernis Esperanton, samtempe propagandis ĝin en la ĵurnalo kaj funkciigis E-kurson en la ĵurnal-oficejo. Post kvarjara penado, en 1931, Jang Lingde, Ŭang Ŝjiĝoŭ, Li Ŝjueju kaj aliaj organizis la Sujĵuan-an E-asociacion. En kelkaj jaroj post la fondiĝo de la asocio, ili eldonis duonmonatan revuon "Esperanto" kaj elkulturis nombron da esperantistoj. Ĝuste en tiu bona situacio, en 1937 eksplodis la Kontraŭjapana

Rezistmilito, pro tio ĉesis la tiea E-movado.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Jang Lingde eklaboris kiel gvidanto de la aŭtonoma regiono. Li estis ankoraŭ fervora por Esperanto kiel antaŭe. Precipe post la Dua Ĉina Esperanta Laborkunveno okazinta en 1979, sub lia iniciato fondiĝis la E-asocio de la Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio, la 5-an de decembro 1979.

Post sia fondiĝo la asocio tuj funkciigis la unuan E-kurson. Maljunaj esperantistoj volonte kaj fervore instruis Esperanton por kulturi la unuajn kursanojn kaj komprenigi al ili la signifon de E-lernado: Ni lernas Esperanton ne por profiti el ĝi, sed por kontribui al E-movado kaj diligente labori por ĝi. Estas ĝojinde, ke ĝuste tiuj kursanoj jam fariĝis aktivuloj de la tiea E-movado.

En 1981 fondiĝis E-asocio en Huhhot, la ĉefurbo de la aŭto-



*La aŭtoro konsultas materialon.*

noma regiono. Propagando kaj instruado de Esperanto des pli vigliĝas kaj profundiĝas. Krom lernantoj, ankaŭ oficistoj kaj laboristoj lernas Esperanton. Nun E-movado disvolviĝas jam en la kultura, komerca, industria kaj trafika sferoj.


La kursanoj lernas Esperanton kun alta entuziasmo. Foje en E-kunsido, iu knabineto parolis Esperante kun natura mieno kaj bela voĉo, pro kio ŝi estis laŭdita de la aŭskultantoj. Fakte, ŝi lernis nur duonjaron, ŝi akiris tian progreson tute dank' al sia diligentececo. Inter la multaj kursanoj la plej rimarkindaj estas mongolaj junuloj, kiuj ĉiuj scipovas pa-



*S-ro Jang Lingde parolas en la ferma ceremonio de Esp-kurso en la Interna Mongolio.*



*Esp-kurso en la Normala Universitato de Interna Mongolio*



*Esp-kurso funkciigata de la Fervojoj-transporta Instituto de Interna Mongolio*

roli han-lingvon kaj tre ŝatas Esperanton. Ili opinias, ke la komuna ĉina parola lingvo ebligas al ĉiuj ĉinaj naciecoj interfluigon de sento kaj penso, dum Esperanto rolas kiel komuna parola lingvo oportuna al la internacia komunikado. Ili aktive kontribuas per siaj fortoj al ĝia propagando kaj disvastigo. La mongola kuracisto Uĝjima dediĉas sian plejparton da postlabora tempo al Esperanto. Ŝi fariĝis Esperanta instruistino, diplomiĝinte el mezgrada E-kurso. Ŝi faras ĉion eblan por bone instrui. Kelkfoje ŝi iris longan vojon por konsulti veteranajn esperantistojn pri vorta uzado kaj prononco.

En la lastaj jaroj la E-asocio de la Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio funkciigis rapidan E-kurson en la fremdlingvaj fakultatoj de la Universitato de la Interna Mongolio kaj la Normala Universitato de la Interna Mongolio. Nun diplomitoj de tiuj ĉi kursoj gvidis E-kurson en tiuj du universitatoj.

Propagandi kaj disvastigi Esperanton en la fervojistaj rondoj estas alia trajto de la tiea E-movado. Fervojo estas aorto de la

nacia ekonomio kaj ankaŭ informacia komunikilo. Utiligante la fervojon, oni povas pli bone disvastigi nian lingvon. Inspirite de la E-movado, fondiĝis en januaro 1984 la asocio fervojist-esperantista de la Huhhot-a Fervoja Buroo. La asocio detale konigis Esperanton kaj E-movadon en kvar paĝoj de la gazeto "Fervoja Scienc-popularigo de la Interna Mongolio" eldonata de la fervojista societo. La gazeto distribuiĝas ne nur en la Huhhot-a Fervoja Buroo de la Interna Mongolio, sed ankaŭ en aliaj fervojaj burooj de Ĉinio. Pro tio ĝi estas vaste influhava. Nun, la asocio havas rilaton kun la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kaj pere de ĝi komuniĝas kun diverslandaj organizoj de fervojisto-esperantistoj. La asocio ankaŭ havas sian E-gazeton "Amikoj de Esperanto", kiu konigas fervojajn sciencajn sciojn, fakajn konversacion, informojn kaj terminojn. La asocio ankaŭ faras propagandon kun la titolo "Kio estas Esperanto?" en la vagonaroj administrataj de la Huhhot-a Fervoja Buroo. Por atingi pli da efikoj la asocio kompilas "Esperanto-Fervoja Manlibro", kiu

konigas Esperanton, fervojajn sciojn kaj apudvojn pezaĝojn.

Por puŝi E-movadon al pli alta etapo la asocio proponis al la tutlandaj fervojisto-esperantistoj, ke ili organizu fervojistajn E-grupojn por plifortigi la interrilatojn inter la tutlandaj fervojistaj samideanoj. La propono estas aprobita de fervojisto-esperantistoj de Ĉjiĉihar, Ĉangĉun, Tangŝan, Guje, Tjanĝin, Tajjŭan, Sanming, Dujun, Uhan, Ningŝja, Ĉifeng k.a.

Nun la E-movado de la Interna Mongolio prosperas. La E-asocioj de la Interna Mongolio de Huhhot kaj de fervojisto-esperantistoj de la Huhhot-a Fervoja Buroo kune funkciigas E-lernejojn "Verda Step" el elementa, mezgrada, konversacia kaj korespondaj kursoj. Nun fondiĝis la Asocio de Inĝeniero-esperantistoj de la Interna Mongolio kaj la Baŭtoŭ-a Junulara E-societo. Esperantistoj de la subregionoj Bajannur, Ŝing'an kaj Ulanĉabu faras aktivan propagandon. Estas antaŭvideble, ke Esperanto disfloros ne nur en urboj, kiaj Huhhot kaj Baŭtoŭ, sed ankaŭ sur la vastaj stepoj.

# MULTLINGVECO KAJ KULTURA EVOLUO

## EN EVOLUANTAJ LANDOJ

Esperantistoj jam scias, pli intuicie ol racie, ke plurlingveco kaŭzas multajn obstaklojn al socia evoluo. La situacio estas aparte malfacila ĝuste en evoluantaj landoj kvankam ne multaj konscias pri tio. Ĉi artikolo celas atentigi pri tio.

### 1. ANALFABETECO

En la evoluantaj landoj vivas preskaŭ ĉiuj analfabetoj de la mondo (49% de la loĝantaro de la evoluantaj landoj) dum en la evoluantaj landoj vivas nur 3% de la mondaj analfabetoj. En Afriko la analfabetaj estas 74% el la loĝantaro. En kelkaj ne pli ol 5% de la homoj konas la skribon. En Azio la situacio estas iom pli bona sed tamen terura. La analfabetaj estas preskaŭ 47% de la homoj. Sume: 35% de la monda loĝantaro estas analfabetoj. 97% de ili vivas en la evoluantaj landoj. Se ni konsideras demografiajn procezojn en tiuj landoj ni facile venos al la konkludo ke plejan parton de ties loĝantaro konsistigas ĝuste la plej junaj. Tiel la problemo montriĝas pli akuta ĉar dum en la evoluantaj la analfabeteco montras naturan tendencon formorti, en la evoluantaj landoj ĝi manifestas malan tendencon nature reproduktiĝadi. Tion tre malfacile povas haltigi tieaj registaroj kies landoj havas nacian brutto-enspezon ofte multe malpli grandan ol estas monata poŝmono de usona knabo.

Kial estas tiel, estas pli-malpli konate. Sed se ni pensas kiel ĉesigi tion kaj ebligi sendependan kulturan kaj ekonomian evoluon de tiuj landoj ni venas al la konkludo ke la rompo de la ĉeno eblas nur sur eduka kampo, en eduka sistemo kiu produktadas proprajn fakulojn edukitajn en siaj lingvoj kaj libroj. Grava obstaklo al tiu celo estas la multlingveco.

### 2. LA MULTLINGVECO

Ankaŭ hodiaŭ la mondo estas malproksime de la situacio en kiu ĉiu infano povus ellerni la unuajn literojn en propra lingvo.

La unua kaj la plej grava kialo estas ke ties lingvo ne estas skribata. En ĝi oni ne verkas librojn, ne estas lernejoj instruantaj per ĝi aŭ en ties ĉirkaŭaĵo ne estas lernejoj.

La dua, ankaŭ ofta, kazo estas ke la lingvoj estas skribataj sed la libroj en tiuj lingvoj estas malpermesataj aŭ ne ekzistas pro iu alia kaŭzo. En multaj landoj oni ankoraŭ pensas ke la ŝtatunueco malplifortiĝos se oni permesas esprimadon de lingvaj kaj kulturaj specifajoj de ties etnoj-membroj. Tiel, ekzemple, pensas Turkio kiu malpermesas al pli ol 8 milionoj da popolanoj uzon de la kurda lingvo aŭ Grekio kiu sufokas ĉiajn esprimojn de makedoneco aŭ albaneco aŭ Francio en kiu preskaŭ tute lingve senrajtaj

estas milionaj Provencanoj, Bretonoj, Vaskoj aŭ Katalunoj. Konklude, oni povas diri ke lingva hegemonio estas pli regulo ol escepto. La esceptoj estas malmultegaj (Svisio, Sovetunio, Jugoslavio, Belgio, Kanado. . .) kaj ili, per siaj variaĵoj, nur konfirmas la regulon.

Sed ni lasu Eŭropon montrinte ke ĝi neniel povas servi kiel modelo. Ni turnu nin al evoluantaj landoj, ĉar la faktoj montras ke ekzistas rekta ligo inter multlingveco kaj neevoluiteco. Ofte evoluantaj landoj estas pli ol centlingvaj. Ekzemple en Afriko, laŭ iuj kalkuloj, en ĉ. 60 landoj oni parolas ĉ. 1 200 lingvojn. Tio estas ĉ. 20 lingvojn laŭlande, konsiderante ke en Sudano estas pli ol 200 lingvoj, en Niĝerio ĉ. 130, en etega Ganao pli ol 20! La plej lingvoza landoj de Azio estas certe Hindujo (pli ol 200 lingvoj) kaj Indonezio (ĉ. 160) sed oni ne neglektu ankaŭ Vjetnamion, ĉ. 30 lingvoj) kaj Ĉinion (ĉ. 50). Ankaŭ Latinameriko ne estas kontinento sen lingvaj problemoj. La plej grava tiusence estas certe Meksikio kaj Brazilo, ĉiu kun pli ol 200 lingvoj, sed ankaŭ Bolivio (ĉ. 30) kaj grave plurlingvaj estas ankaŭ Nikaragŭo, Gŭatemalo, Kolumbio, Peruo, Ekvadoro kaj Paragŭaĵo. Por ne miskompreni, kelkajn el tiuj lingvoj parolas eĉ milionaj popoloj kiel Maja, Tupi, Keĉua aŭ Guarani.

Se ni ĉion rekalkulus ni venus al la cifero de ĉirkaŭ 3 000 lingvoj en la mondo. El tio nur ĉ. 500 estas skribataj sed vaste praktikataj estas nur ĉ. 200. Tere, ĉu ne? Nun oni povas kompreni, ke la plej granda parto de popoloj de la mondo estas analfabetaj kaj malebligataj en sia kultura evoluo.

Per tio la monda kulturo nur perdas, ĉar la plej granda parto de la monda trezoro, spertoj, artoj ktp. restas nekonata kaj neatingebla. Dume intensiviĝas kontraŭaj tendencoj de kultura kaj civilizacia uniformiĝo sub ŝildo de *coca-cola* kulturo.

### 3. KIUN LINGVON ELEKTI?

Plejmulto de la landoj ĉi tiun enigmon provis solvi ĝuste per eliminado de la enigmo altrudante unu lingvon al la tuta socio. Tia provo malsukcesis kaze de la hindua lingvo en Hindujo sed lingva ekskluziveco restis realo de ĉiuj Latinamerikaj landoj (oficialigo de la keĉua en Peruo estas tiusence tute sengrava ĉar ne ekzistas lernejoj kaj publikaĵoj en tiu lingvo). Politiko de altrudado ofte havas sangajn postsekvajn; ekzemple en Indonezio kiu altrudas *Bahasa indonezia* kiel solan ŝtatlingvon. Simila estas la situacio de ĉ. 16-miliona kurda popolo en Irako, Irano, Turkio kaj Sirio, Berberoj en Alĝerio, Tunizio kaj Maroko ktp. Bomboj tondris ankaŭ en pacema Svislando nur antaŭ kelkaj jaroj (kantono Jura). En Afriko etnaj kaj lingvaj limoj ofte koincidas kun la politikaj. Tiel ekz. la konflikto inter Mugabe kaj Nkomo en Zimbabveo estas samtempe konflikto inter la maŝona kaj matabelea etnoj. En Tanzanio la problemo estas solvita sagace per enkonduko de la ŝuahilia kiel oficiala lingvo. Ĝi estas oficiala ankaŭ en

Kenjo, apud la angla. Sed tio estas nur pro tio, ĉar sur tiu tereno ekzistis tia "sagaca" lingvo kiu apartenas al ĉiuj kaj estas de neniu, same kiel Esperanto. En aliaj afrikaj landoj kun grandaj lingvoj (hausa, ŭolof, mandingo ktp) kiuj tamen, malgraŭ sia plurŝtateco, estas etnaj lingvoj, altrudo de unu lingvo eksplodas kvazaŭ bombo. En tiaj cirkonstancoj la plej saĝa montriĝas flegado de momenta situacio kio fakte signifas konservadon de la eŭropa lingvo de la ekskoloniiganto en publika kaj oficiala uzo. Tiel konserviĝas ankaŭ klasa strukturo de tiuj landoj. ĉar oni malebligas al ĉiuj kiuj ne konas la monopoldonan lingvon aliĝi al la reganta elito kaj malebligas ian ajn demokratiigon de la politika vivo. Krome la lando restas strikte ligita al la eksmastro kaj la lingva elito komplete alieniĝas (eŭropiĝas) ankaŭ kulture kaj spirite.

Edukado en tiuj landoj per eŭropaj lingvoj estas praktike ne-realigebla por pli vastaj sociaj tavoloj. En Angolo oni forpeladis alfabetigistojn per sloganoj "Alfabetito jes, sed ne en la portugala!" Pro simpla kaŭzo en Angolo la portugalan parolas malpli ol 1% de la loĝantaro. Tiu elcentaĵo ne estas multe pli granda en Hindujo (la angla) aŭ Burundio (la franca) aŭ Surinamo (la nederlanda) kaj aliaj ekskolonioj.

### 4. PRAKTIKA PROBLEMO: LA LIBROJ

Se iu lingvo el evoluanta lando posedas skriban kaj lernejojn aŭ nur lernejojn en eŭropaj lingvoj ekestas nova problemo: ne estas libroj. Pro multaj kialoj ofte afrikaj infanoj povas vidi kaj uzi librojn nur en la lernejoj. Aliaj libroj en iliaj lingvoj ne estas kaj se estas en eŭropaj lingvoj (aŭ eĉ en la indiĝenaj) estas malmul-

teĝaj infanaj libroj (kio tre gravas por formado de legokutimo) kaj ĝenerale tro multekostaj por malriĉaj afrikaj gepatroj. Se afrika infano iel akiras unu libron, ĝi ne havas tempon por legi, ĉar ĝi devas labori en familio kaj se li volas legi vespere, ni rememoru, tio ne eblas pro manko de elektro en plej granda parto de afrikaj vilaĝoj.

Ni imagu ke ne gravas (kvankam gravegas!) la altaj prezoj. Sed tiam aperas alia obstaklo: en evoluantaj landoj estas tre malmultaj eldonejoj kaj tie kie ili estas oni, plej ofte, eldonas en eŭropaj lingvoj, ĉar tiel la eldonaĵoj havas pli grandan merkaton. Multaj verkistoj turnas sin al tiuj lingvoj, kion la propra popolo kaj legantoj fakte ne konas. Oni ankaŭ importas multajn librojn (25% de la totala uzata librostoko) sed tiuj lernolibroj estas ofte ridindaj, aŭ, pli bone, plorigindaj ĉar ili montras tute nekonatan medion por afrika aŭ azia infano: neĝon, metropoliton k.s. Pli ridindas la imitado de la modelo de ferioj: lernejo en Burundio havas somerajn kaj vintrajn feriojn kvankam tie ne estas vintro! En Centrafrika Respubliko ferioj estas julie-aŭguste kiam tie estas ĉiutagaj pluvoj kaj dum vera "somero" en januaro la infanoj vizitas lernejojn.

Sed ni komencis per libroj. Ni vidu statistikojn de UNESCO pri libroeldonado en 1976-a. Tiun jaron en la mondo aperis ĉirkaŭ 570 000 diversaj titoloj. El tio 30 landoj en kiuj vivas 1/3 de la monda loĝantaro produktas pli ol 80%. (Eŭropo 48%, Usono k. Kanado 17%, Sovetunio 14%). Nur 13% de la monda libro-trezoro donas Azio (sen Japanio) kaj Latinameriko kvankam tie vivas pli ol duono de la monda loĝantaro. En araba mondo kiun konsistigas pli ol 20 landoj oni jare

publikigas nur 5 000 titolojn, do 1 libro (titolo) por 30 000 homoj! En Afriko 1974-an oni eldonis 10 000 librojn kio estas iom malpli ol en Jugoslavio. La sama kvanto aperis en Hindujo. La diferencoj en grandeco kaj nombro de loĝantoj kaj lingvoj inter tiuj du landoj estas konataj!

Ni diru krome, ke la saman jaron Usono eksportis librojn en valoro de 243 milionoj da dolaroj. Granda Britio eksportas ĝis 40% de sia produktokvanto, 20% el ili estas lernolibroj por evoluantaj landoj.

Evidente ke sen forigo de ĉi obstakloj la evoluo de la homaro

ne iros la vojon deziratan de la plej homamaj kaj progresemaĵoj sed tiun de uniformigo kaj strikta malegaleco inter popoloj kaj ŝtatoj. Kondiĉo por uzo de Esperanto estas evoluo de etnaj lingvoj kaj kulturoj. Tiam ĝi vere plenumos sian rolon de interlingvo.

# Novaj Libroj

## DE LA ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

aperintaj en 1984

**Chun-Chan Yeh: MONTARA VILAĜO (romano) trad. W. Auld**

	272pĝ.	£3,85	US\$7,80	10-Es-1882S
<b>BUKEDO AL VI (mikronoveloj)</b>	96pĝ.	£0,65	US\$1,30	10-Es-1881P
<b>LA FELIĈA BIRDO (popolrakontoj)</b>	56pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1866P
<b>PAPILIA FONTO (popolrakontoj)</b>	68pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1883P
<b>MAGIA ŜIPO (popolrakontoj)</b>	76pĝ.	£0,50	US\$0,95	10-Es-1623PA
<b>MIA VIVO</b>	128pĝ.	£0,80	US\$1,70	17-Es-1884P
<b>PITORESKA PEKINO</b>	74pĝ.	£0,95	US\$2,00	17-Es-1827P
<b>DEK SES URBOJ DE ĈINIO</b>	176pĝ.	£1,90	US\$3,90	17-Es-1885P
<b>ALBUMO PRI ĈINIO</b>	96pĝ.	£1,90	US\$3,90	85-Es-175P
<b>KNABINO GINSENGO (infanlibro)</b>	40pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-177P
<b>HEJMOJ DE BIRDOJ (infanlibro)</b>	40pĝ.	£0,95	US\$2,00	88-Es-203P
<b>KOLORIGU (infanlibro)</b>	120pĝ.	£2,90	US\$5,90	88-Es-205P
<b>BONKORA ŜJAUDON (infanlibro)</b>	60pĝ.	£1,10	US\$2,30	88-Es-204P
<b>BRAVA KOLOMBIDO (infanlibro)</b>	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-244P
<b>PETOLEMA KAPRIDO (infanlibro)</b>	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-241P
<b>LUTRO KAJ BUFO (infanlibro)</b>	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-242P
<b>KOKIDO VENĜIS SIAN PANJON (infanlibro)</b>	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-246P
<b>DU KATETOJ (infanlibro)</b>	20pĝ.	£0,65	US\$1,30	88-Es-243P
<b>MAPO DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO</b>		£0,50	US\$0,95	12-Es-1598P

Mendu ĉe:

Libroservo de UEA

Perantoj de EPC

aŭ

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN),

Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Foto de D-ro Zamenhof



D-ro Zamenhof inter Kopenhagaj esperantistoj

## SUR NIA LIBROBRETO

# Pli ampleksan albumon pri Zamenhof!

LA VIVO DE D-RO L. L. ZAMENHOF EN BILDOJ kompilita kaj eldonita de Henk Thien, la fondinto kaj prizorganto de la Foto-servo pri Zamenhof. Formato: 21 x 30 cm. 128 p. Prezo: 30.00 gld.

Kvankam multaj el la esperantistoj jam vidis unu aŭ du fotojn de d-ro L. L. Zamenhof en libroj kaj gazetoj, tamen mankas ŝancoj al la esperantistaro vidi tiel riĉan kolekton de 114 fotoj kiel tiu ĉi albumo. Sciu, ke ili estas elektitaj el 260 fotoj kolektitaj de s-ro Henk Thien, do nur parto de la trezoro. Tiuj 114 fotoj pri d-ro L. L. Zamenhof kaj 25 mapoj pri la lokoj kie aktivis liaj prapatroj, li mem kaj liaj familianoj, kronike ordigitaj, prezentas riĉan ilustraĵon por legantoj de biografioj de la majstro, kiel "Vivo de Zamenhof". Eĉ por tiuj, kiuj jam havas la riĉe ilustritan "Enciklopedion de Esperanto", la albumo verŝas abundan lumon por pli klare vidigi vivobildojn pri la kreinto de la internacia lingvo. Estas rimarkinde, ke foto pri lerneĵano Ludoviko ĉirkaŭ 10-jara

jam montras lin tre serioza, same kiel la fotoj pri la 16-jara kaj 19-jara studento kun rigardo al la malproksima estonto. Plejparto de la fotoj pri la posta aktivado de L. L. Zamenhof montras lin milda, afabla kaj ofte kore ridetanta. Tiuj pri lia aktivado en Universalaj Kongresoj de Esperanto memorigas al mi lian diron al sia frato Leono Zamenhof: "Ĉiu kongreso donas al mi senliman kontenton, kaj pruvas, ke nia ideo estas venkanta; sed samtempe ĉiu el ili mallongigas mian vivon je kelkaj jaroj."

Antaŭ unu jaro, iu ĉina pentristo verkis serion da bildoj pri la vivo de L. L. Zamenhof kaj ĝin sendis al la redakcio de El Popola Ĉinio por konsideri pri ĝia eldonebleco. Kelkaj el liaj bildoj estas tre vivecaj, tamen la bildoj pri la juna Ludoviko estas misfaritaj — la knabo havas grasan rondan vizaĝon, anstataŭ iom longa ne-grasa. Evidente, tio okazis pro manko de necesaj fotoj pri L. L. Zamenhof en knabeco al la pentristo. Se la pentristo havus riĉan

kolekton de fotoj, li povus verki bonan bildrakonton pri la majstro. Ankaŭ la fotoj pri portretoj olepentritaj, poŝtmarkoj kaj statuoj de d-ro L. L. Zamenhof kaj kelkaj stratoj kaj placoj titolitaj per lia nomo povas utili al interesiĝantoj pri la vivo de la majstro.

Kvankam la albumo el bonkvalita papero estas jam riĉa kaj utila, tamen mi opinias, ke estas dezirinde eldoni ankoraŭ pli ampleksan kaj pli lukse vestitan albumon pri la kreinto de la internacia lingvo, okaze de la centjara jubileo de Esperanto.

Recenzis Laŭlum

## NOVE RICEVITAJ LIBROJ

LA ROBAIOJ de Umar Kajjam en traduko de prof. Gaston Waringhien. Eldonita de TK Stafeto. Kolekto de 211 robairoj esperantigitaj el la persa originalo. Formato: 14.5 x 21 cm. 107 p. Prezo: 12 gld. Mendebila ĉe la Libroservo de UEA.

NE NUR LETEROJ DE PLUM-AMIKOJ Broŝuro originale ver-



kita de M. Boulton pri la esperanta literaturo. Eldonita de la Eldona Societo Esperanto. Formato: 14.3×20 cm. 63 p. Prezo ne montrita.

**KOMPUTADA BAZA TERMINARO** kun 369 bazaj terminoj difinitaj en Esperanto. Kompilita de Gerhard Kalckhoff kaj Antony C. Pick en kunlaboro kun ing. Auguste Broise. Eldonita de la Germana Esperanto-Asocio. Formato: 14.5×21 cm. 52 p. Prezo: 9.8 G. M.

**LA CENTA SIMIO** de Keyes Jr. (Ken), esperantigita de Joek Neberkeller. Eldonita de la Internacia Esperanto-Instituto. Formato: 9.3×19.5 cm. 135 p. Prezo: 7.5

gld. plus sendkostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj.

**LA MONTA** originala romano de Istvan Nemere, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14×20.5 cm. 166 p. Prezo 21.00 gld. plus sendkostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj.

**VORTOJ DE ANDREO CSEH** kolekto de 66 artikoloj de A. Cseh, redaktita de E. Borsboom. Eldonita de Societo Andreo Ĉe. Formato: 13×20 cm. 210 p. Prezo ne montrita.

**DISKRIMINACIO** kolekto de 23 prelegoj kaj komentarioj pri la kongresa temo de la 65-a UK,

aranĝitaj de d-ro Renato Corsetti. Eldonita de UEA. Formato: 15×20.7 cm. 175 p. Prezo: 21.00 gld. plus sendkostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj.

**SEP VANGOFRAPOJ** romano de Karoly Aszlanyi, el la hungara tradukita de Laszlo Somlai. Dua eldono, farita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14×20 cm. 148 p. Prezo: 15.00 gld.

**VARMEGA KAMPARO** romano de Zsigmond Móríc, el la hungara tradukita de Istvan Nagy, lingve reviziita de William Auld. Eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 14×20 cm. 169 p. Prezo: 18.00 gld.

## POR KOMENCANTOJ

# GEEDZIĜA

# FESTO

Ŭang Ĉunĵing kaj Jang Fuĉjun decidis okazigi sian geedziĝan feston antaŭvespere de la Novjaro. Tiam jam finiĝis la aŭtuna rikolto kaj aliaj kampaj laboroj. La samvilaĝanoj ne estis okupitaj, kaj la geedziĝa festo povis esti pli pompa.

Kiel ili enamiĝis unu al la alia? Jen mallonga historio:

Muro de la domo de la knabino Ĉunĵing estis kaduka. Iun someran tagon la muro falis de pluvego. Ŝia patro jam forpasis. Ŝi ne havis fraton. Tial mankis al ŝi laborantoj por rekonstrui la muron. Tiam kelkaj bonkoraj junuloj en la vilaĝo iniciate venis

helpi ŝin. Unu el ili nomiĝis Jang Fuĉjun. Li estis bela kaj lerta. Li profunde impresis ŝin.

Depost tio, Fuĉjun ofte venis helpi ŝin, kiam estis peza laboro en ŝia hejmo. Poste Fuĉjun ofte vizitis Ĉunĵing. Tiel oftigis ilia intervizito, ke fine amo naskiĝis al ili. Ili do decidis geedziĝi.

Ĉar Ĉunĵing ne havis fraton, Fuĉjun do decidis loĝi ĉe ŝi post la geedziĝo. Tio estis maloftaĵo en la vilaĝo.

En la festa tago la patrino de Ĉunĵing estis tre ĝoja. Ŝi purigis la domon kaj ordigis ĝin. Preskaŭ ĉiuj junuloj de la vilaĝo ĉeestis la feston. Fuĉjun kaj Ĉunĵing



sidis meze de la ĉambro. Oni petis la junan paron kanti kaj rakonti pri la amhistorio. La ĉambro estis plena de vigla babilado kaj sonora ridado.

Rigardante la feliĉan paron, la patrino de Ĉunĵing rememoris sian pasintecon: Ŝi edziniĝis laŭ la feŭda etiko. Antaŭ sia edziniĝo ŝi neniam vidis sian edzon. "Tia tago forpasis por ĉiam!" pensis la patrino.

**LA SENŜJI-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA**

La 31-an de marto la Senŝji-a Esperanto-Asocio okazigis sian fond-kunvenon en la provinca ĉefurbo Ŝjan. La kunvenon salutis respondecoj de la Oficejo de Eksteraj Aferoj, la Federacio de Soci-Sciencaj Asocioj, la Turisma Buroo kaj iuj altlernejoj de la provinco. En la kunveno oni diskutis pri la statuto de la asocio kaj ĝin aprobis, kaj difinis la taskon de la asocio.

**LA ĈINA KORESPONDA ESPERANTO-INSTITUTO FUNKCIIGAS ESPERANTO-KURSON**

Por kulturi esperantistojn por diversaj lokoj, la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto kaj la Trejna Instituto por Kulturaj Oficistoj kune funkciigas Esperanto-kurson. En la kurso lernas 33 gejunuloj el 21 urboj. Dum ok monatoj ili havos lecionojn pri Esperanto, ĝia konversacio, la ĉina lingvo kaj fotografio. Samtempe ili lernos

*Sju Sanŝu, respondeculo de la redakcio de El Popola Ĉinio, parolas en la inaŭguro de Esp-kurso.*



*La fond-kunveno de la Senŝji-a Esperanto-Asocio ĉeestata de koncernaj respondecoj*

ankaŭ tajpi kaj korekti presprovaĵojn. La kursanoj jam komencis lerni en la 11-a de marto. Ilin instruas esperantistoj kaj redaktoroj de EPC.

**ESPERANTA LERNOGRUPO SUR STEPO DE LA INTERNA MONGOLIO**

En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio troviĝas laborejo sur la stepo Morin Daŭa. Ĝi havas

12 oficistojn kaj laboristojn de la dahura, mongola, evenka kaj hana naciecoj. Unu el ili komencis lerni Esperanton en 1984. Post unu jaro jam ses personoj ĝin lernis. Tiuj diverslingvanoj esperas posedi Esperanton kiel sian komunan lingvon.

Lastatempe la ses memlernantoj organizis lernogrupon. Ili ope lernas du posttagmezojn ĉiusemajne. Ili ankaŭ prenas lecionojn de iu koresponda Esperanto-lernejo. Ili unuope lernas unu horon ĉiutage post la laborado.

**INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO EN NICO**

Sub la honora prezidanteco de la Deputito-urbestro de Nico la Internacia Esperanto-Semajno okazis de la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo ĉe la lazura marbordo de Francio. Al ĝi aliĝis 120 samideanoj el 9 landoj kaj 22 francaj departementoj. Dum la Semajno 4 E-Kursoj estis regule sekvataj de la plimulto de la partoprenantoj kaj gviditaj respektive de s-ino Mounier, s-ro Claudel, s-ro Luez kaj s-ro Moirand, profesoro pri Esperanto en Aix-en-Provence.



*Ges-anoj en la Internacia Esperanto-Semajno en Nico*

La turismoficejo de Nico eldonis prospekton en Esperanto pri Nico.


### UNUA TRILANDA RENKONTIĜO

Vojvodina Esperanto-Ligo en Novi Sad kaj Esperanto-Societo en Subotica organizos la 1-an Trilandan Renkontiĝon de esperantistoj el Hungario, Rumanio kaj Jugoslavio inter la 6-a kaj la 8-a de septembro 1985 en Palić, Jugoslavio. Dum la Trilanda Renkontiĝo, se ĝin partoprenos konsiderinde granda grupo de infanoj, la organizantoj preparos specialan porinfanan programon. Pri detalaj informoj bonvolu skribi al: Esperanto-Societo Trilanda Renkontiĝo, Trg cara Jovana Nenada 3, 24000 Subotica, Jugoslavio.

### NOVA BIBLIOTEKO

Dezirante doni al la homaro rimedon per kiu diversnaciaj popoloj povus senpere kontaktiĝi kaj ebligi al la homoj ekkoni alian landon, aliajn homojn, morojn, kulturon, Beograda Esperanto-Societo "Radomir Klajić" fondis novan bibliotekon "Perloj de jugoslavia literaturo". Baldaŭ aperos prospekto pri la biblioteko. Ĉiujn informojn koncerne la bibliotekon vi povas ricevi de Esperanto-Societo "Radomir Klajić", Terazije 42 11000 Beograd, Jugoslavio.

*Post sia studado en la porinstruista kurso prof. Paŭlo Amorim Cordoso ricevis ateston de Leda Gama, EAB-sekretariino. Maldekstre: Neia Lucia, prezidantino de EAB.*



### SPECIALAJ KURSOJ POR E-INSTRUISTOJ

En februaro 1985, Esperanto-Asocio de Brazilo okazigis du porinstruistajn E-kursojn kun 50 partoprenantoj el 7 ŝtatoj. Kelkaj inter ili vojaĝis eĉ pli ol 2 500 kilometrojn por aliĝi al la kursoj.


*Ĉinaj Esperantaj libroj montrataj en ekspozicio en Torino*

### EKSPOZICIO PRI LERNEJA KORESPONDADO

La dektaga speciala ekspozicio pri lerneja korespondado fare de s-ro Carla de Lorenzi okazis en novembro 1984 en Torino, Italio. Inter la eksponaĵoj ĉinaj E-libroj vekis grandan intereson ĉe la vizitantoj. Ili multe ŝatas la antikvajn fabelojn, modernajn historiojn kaj la tradiciajn legendojn de Ĉinio.



# POST LA INTERNACIA GIMNASTIKA TURNIRO



*Jang Jŭešan en duringado*

La Ŝanhaja Internacia Gimnastika Turniro, kiu daŭris tri tagojn, finiĝis vespere de la 16-a de aprilo. La sekvantan tagon mi turisme vojaĝis al la ĉarma urbo Uŝji, kune kun gimnastoj de Bulgario, Kanado, Francio, Japanio, Rumanio, Sovetunio, Usono kaj Ĉinio.

## **ĈINA GIMNASTO JANG JŬEŜAN**

En la ekskurso ĉina gimnasto Jang Jŭešan estis la plej gaja. Tenante en la mano bonkvalitan fotoaparaton kun marko Nikon,

li navete iris inter siaj enviemaj kamaradoj.

En la turniro la 20-jara Jang Jŭešan gajnis tri orajn medalojn en ĉevalado, senansa ĉevalado kaj kunmetita konkurso. Krome, en la libera prezentado li faris 1 080-gradan korpoturniĝon ĉirkaŭ reko per unu brako kaj 360-gradan korpoturniĝon ĉe paralelo kaj per tio li gajnis varman aplaŭdon de la rigardantoj.

Tiu juna pekina sportisto kun diketa vizaĝo jam pasigis dek jarojn en la gimnastika kampo. En 1975 la dekjara Jang Jŭešan

estis akceptita en la Pekinan Gimnastikan Teamon. Post kvar jaroj li debutis kiel ĉampiono de la kunmetita konkurso en la Tutlanda Geknaba Gimnastika Ĉampionea Konkurso.

Nun li estas alte taksata de la internaciaj gimnastikaj rondoj. Sovetunia trejnisto diris, ke li reprezentas tendencon de la estonta gimnastika disvolviĝo.


Pro la streĉa gimnasta vivo longtempe mankis al li ŝanco ĝui ekskurson. Post babilo kun mi, li rapidis kun fotoaparato al siaj kamaradoj kvazaŭ por trovi la perditajn minutojn.

## **SINGARDEMAJ SOVETUNIAJ SPORTISTOJ**


Sur la printempa Tajhu-lago mi konatiĝis kun sovetuniaj gegimnastoj pere de interpretisto. Videble, ili estis iom singademaj. Precipe la 15-jara A. Ŝenikova kun ridmieno aspektis jam plenkreska.

A. Ŝenikova estas bone konata de la ĉinaj rigardantoj. En la Pekina Internacia Gimnastika Turniro okazinta en la pasinta jaro ŝi gajnis la ĉampionecon de trabado. En la nuna turniro, ŝi gajnis du orajn medalojn en senansa ĉevalado kaj kunmetita konkurso.

Ŝi estas nova sentimentala stelulino, amanta la modernan muzikon kaj verkojn de Tolstoj. En tiu ĉi turniro ŝi du-foje ploris.



*Ĉina sportistino Sju Jemej (maldekstre)  
kaj franca gimnastino antaŭ konkurso*



*A. Senikova sur trabo*

Foje, kiam ŝi sukcese faris liberan prezentadon sur trabo kaj konsciis sian ĉampionecon de la kunmetita konkurso, ŝi ploris de ĝojo. Aliffoje, kiam ŝi falis de sur trabo en la finalo de individua konkurso kaj ŝia trejnistino ĉirkaŭprenis ŝin, ŝi ploris de ĉagreno.

En la turniro la duan lokon de la individua kunmetita konkurso kaj la unuan lokon respektive de grundgimnastiko kaj duringado gajnis sovetunia sportisto J. Korolev, kiu aĝas nur 22 jarojn,

tamen jam fariĝis "veterano". Antaŭ kvar jaroj li gajnis du orajn medalojn en grundgimnastiko kaj kunmetita konkurso en la 21-a Monda Gimnastika Ĉampionecca Konkurso. Li edziĝis antaŭ du jaroj kaj havas unujaran knabeton. Sed en la turniro li montriĝis ankoraŭ tiel lerta kiel antaŭe.

Kvankam en la konkurso li faris kelkajn gravajn mismovojn sur reko, tamen la rigardantojn profunde impresis lia 360-grada korpturniĝo ĉe paralelo kaj liaj

du sinsekvaj transkapiĝoj malantaŭen kun rektigita korpo en grundgimnastiko.

Fine J. Korolev diris al mi, ke li partoprenos en la 23-a Monda Gimnastika Ĉampionecca Konkurso okazonta en tiu ĉi jaro en Kanado kaj tiam li plenenergie strebos por venki ĉinajn gimnastojn.

### **"NI VENIS POR AMIKECO"**

En la ekskurso estis tre gajaj ankaŭ du francaj sportistinoj, studentinoj de la Pariza Sporta Instituto. Ili prenas lecionojn antaŭtagmeze kaj trejniĝas posttagmeze. Ili mem aĉetis iujn gimnastikilojn. Kvankam ili ne atingis bonajn sukcesojn en la turniro, tamen ili ĉiam serioze traktis la konkurson kaj varme manpremis alilandajn konkurstantojn. Ili diris: "Ni venis por amikeco."

Ilia trejnisto Ŭang Ĝongbo estas ĉino, iama trejnisto de la Ljaŭning-a Gimnastika Teamo de Ĉinio. En la pasinta jaro la Franca Gimnastika Asocio invitis lin funkcii kiel trejnisto de la Virina Gimnastika Teamo de Francio por unu jaro.


S-ro Ŭang estas maldika mezaĝulo. Foje, en ĵurnalista kunveno okazinta nelonge post lia alveno al Francio ĉeestantoj bombardis lin per diversaj tekni-

*Ŭang Gongbo (la dua de dekstre)*





*J. Korolev en reka konkurso*



*Jang Jūešan (maldekstre) kaj J. Korolev*

kaj demandoj por juĝi lian kompetentecon. Li donis fluan respondon. Dum trejnado de la franca teamo li proponis serion da sciencaj instrumentoj, kio ricevis laŭdon de la franca kunlaborantino. S-ro Ŭang jam laboris kvar monatojn en Francio, kaj nun la Franca Gimnastika Asocio oficiale proponis, ke lia laborado estu longigita je unu jaro.

### **PRI KIO PENSIGAS LA TURNIRO?**

Inter la konkursantoj estis iom silentemaj Ĝang Ĝjan, trejnisto de la Vira Gimnastika Teamo de Ĉinio, kaj Ŭang Ŭejĝjan, trejnisto de la Virina Gimnastika Teamo de Ĉinio. Sendube, la turniro multe pensigis ilin.

Malkaŝe dirite, la turniro ne montris tre altan nivelon. La sportistoj ne povis tuj adaptiĝi al la nova regularo, tial ilia prezento ne estis tiel perfekta kaj preskaŭ ĉiu sportisto havis tian aŭ alian mismovon. Tamen la turniro karakteriziĝis okulfrappe per tio, ke ĝi estis la unua grava

internacia konkurso, post kiam la Internacia Gimnastika Federacio proklamis la novan regularon pri gimnastika arto (la federacio tiel faras post ĉiu kvara jaro), kaj ke ĝi estis elmontro de la rezervaj fortoj de gimnastiko en diversaj landoj.

Forlasante iun montsupron, mi iris ĝuste kun trejnistoj Ĝang Ĝjan kaj Ŭang Ŭejĝjan. Mi petis iliajn opiniojn pri la turniro.

S-ino Ŭang estis kontenta pri sia teamo, precipe pri ĝia membro Jang Janli, kiu gajnis tri orajn medalojn en grundgimnastiko

*(Daŭrigo sur p. 30)*

*Ĉampiono Jang Jūešan (ĉino), subĉampiono J. Korolev (sovetiano) kaj gajninto de la tria loko M. Kukuljin (sovetiano) sur podio*



# SOVAĜA KAMELO EN ĈINIO

Printempon de 1984, en Hami, nordoriente en la Sinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, unu sovaĝa virkamelo entrudiĝis en kamelaron bredatan de kazaĥoj. En tiu sezono la bestoj estas en seksardo kaj ofte okazas, ke sovaĝaj virkameloj eniras en dresatan kamelaron aŭ paŝtataj virkameloj eniras en sovaĝan kamelaron. Iliaj posteuloj estas pli adaptiĝemaj, tial paŝtistoj tion ne malhelpas. Sed tiu ĉi sovaĝa kamelo estas eksterordinara. En kelkaj sinsekvaj tagoj ĝi entrudiĝis trans la barilaron de la kameloj kaj mordis kaj piedbatis la bredatajn kamelojn, kiuj neniam spertis tian batalon kaj terurite forkuris vunditaj. Videblis, ke la sovaĝa kamelo volas sole posedi la gregon da kamelinoj.

La paŝtistoj koleriĝis pro tio, ke la palisaro de la gregejo grandparte estis faligita. Ili decidis forpeli la sovaĝan kamelon, kiu malgraŭ sia forteco, tamen timis homojn. Vidinte paŝtistojn, ĝi tuj forkuris transsaltinte la barilaron metron altan.

Se ĝi plu ne venus, do ĉio finiĝus pace. Fakte ĝi ne kuris foren kaj kiam la paŝtistoj foriris, ĝi revenis senbrue kaj denove mordis la restantajn kamelojn por mastri la kamelinojn.


La sovaĝaj kameloj estas unuaklasa protektata besto, kaj neniu rajtas vundi ilin. Ĝuste pro tio la paŝtistoj povis fari nenion kontraŭ ĝi malgraŭ ke ĝi levis ĥaoson plurfoje.

*Sovaĝaj kameloj serĉas manĝaĵon.*

Perdinte paciencon, la paŝtistoj proponis al koncerna instanco, ke ili kaptu ĝin viva. Permesite, ili kolektis pli ol 30 fortajn junajn kazaĥojn, prenis jungŝnuron kaj, rajdante sur ĉevalo, senbrue ĉirkaŭis la sovaĝan kamelon.

Trovinte la homamason, la sovaĝa besto iris kelkpaŝe malantaŭen, transsaltis la palisaron kaj forkuris. La junuloj postkuris ĝin kaj post longa klopodo ĵetis la jungŝnuron sur ĝian kolon, dum la sovaĝa besto furioziĝis kaj ekkuregis. Poste, en poplaro, la paŝtistoj volvis la ŝnuron ĉirkaŭ arbotrunkon kaj fine kaptis la beston.

Nun la sovaĝa kamelo estis sendita en zoon de Urumĉi. Ĝis nun



# UŜJI, PERLO ĈE TAJHU-LAGO

de TAŬ ŜJAŬ JOŬ kaj JAŬ ĈJI  
Fotoj de HAJ FENG

“Ĉarma Tajhu-lago allogas per la bela akvo”, jen vortoj el kanto ŝatata kaj populara. La kanto prikantas Tajhu-lagon, la trian grandan lagon de Ĉinio, kun areo de 2 420 kvadrataj kilometroj, situantan sur la limo inter la provincoj Ĝjangsu kaj Ĝeĝjang. La lago havas 48 grandajn kaj malgrandajn insulojn kaj duoninsulojn

lojn kun 72 montpintoj. Brakumita de montoj, la lago havas ĉarmon de lago kaj superban vastecon de maro.

Uŝji estas urbo plej taŭga por ĝui la pejzaĝon de Tajhu. Ĝi estis lulilo de la kulturo de U-regno, antikva ĉina civilizacio. Norde de la urbo preterfluas Jangzrivero kaj sude estas Tajhu-lago.

La urbo najbaras al la turisma urbo Suĝoŭ en oriento kaj la fajenca urbo Jiŝing en okcidento. La urbon Uŝji trafluas la fama Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangĝoŭ kaj oni titolis ĝin “perlo ĉe Tajhu-lago”.

La vidindejoj de Uŝji lokiĝas ĉefe laŭ la bordo de Tajhu, kiel la poeziaj parkoj Lijŭan, Mej-

(Daŭrigo de p. 29)

en la ĉinaj zooj troviĝas jam 4 sovaĝaj kameloj. Bedaŭrinde ĉiuj ili estas viraj kaj ne povas generi idojn.

La duĝibaj sovaĝaj kameloj estas unika specio de sovaĝa kamelo en la mondo hodiaŭ. Ili vivas sole en Ĉinio. Antaŭe Afriko estis unu el iliaj hejmlokoj kaj ĝuste tie oni plej frue dresis kamelojn. Sed nun la sovaĝa kamelo jam ne plu troviĝas en Afriko. El la diversaspecaj sovaĝaj kameloj vivantaj en la historio nun postvivis nur la duĝibaj, troveblaj en nordokcidenta Ĉinio. Nun en Ĉinio la sovaĝaj kameloj nombras 800-1 000, preskaŭ samnombraj al la grandaj pandoj.

Kompare kun la bredataj kameloj, la sovaĝaj estas iom altaj

sed malgrasaj kun ĝiboj malpli grandaj, kio rezultiĝis eble pro manko de manĝaĵoj. Krome iliaj hufoj estas pli grandaj, kiuj plifaciligas ilian agadon sur mola sablo. La koloro de ilia hararo estas pli hela, simila al la medio, tio montras singardecon de la animaloj.

La vivkondiĉoj de la sovaĝaj kameloj estas malbonegaj. Proksime de Lopnur de Ŝingĝang estas valo Aĉĵik. Tie sur la sovaĝa spaco de kelkcent kilometroj maldense kreskas fragmitoj kaj alhagoj (*Alhagi pseudalhagi*) nemanĝataj eĉ de bovoj, kaproj kaj leporoj. Jen la manĝaĵoj de la sovaĝaj kameloj. Parolante pri kameloj oni ĉiam imagas al si dezerton, sed esploro raportis, ke la sovaĝaj kameloj fakte ne ŝatas vivi en dezerto, ankaŭ ili bezonas

manĝaĵojn kaj akvon. Ili fuĝas profunden en dezerton nur kiam ili estas minacataj.

La sovaĝaj kameloj havas mirindan eltenemon al malsato kaj soifo. Kun speciala korp-strukturo ili povas plej efike utiligi la enkorpan akvon kaj malmultigi ĝian vaporigon. La kameloj estas unu el la animaloj plej malmulte ŝvitantaj. En la varma somero la sovaĝaj kameloj povas vivi kelkajn tagojn sen trinki kaj dekojn da tagoj en vintro, kaj plie la sovaĝaj kameloj trinkas nur salan akvon kaj ne la dolĉan.

La sovaĝaj kameloj estas protektataj animaloj en Ĉinio. Nun oni faras ĉion eblan por forigi la minacon de la naturo por ke tiu specio prosperiĝu generacio post generacio.

(Daŭrigo de p. 28)

ko, ŝtupa paralelado kaj trabado el la kvar virinaj individuaj konkursoj. Ŝi montris ankaŭ, ke, kvankam Jang atingis la mondan nivelon en iuj movoj, tamen ŝi havis mankojn en forto kaj rapideco. Tiajn mankojn havis ankaŭ

la elstara sovetunia gimnastino A. Ŝenikova.

Ankaŭ s-ro Ĝang kontentis pri la rimarkinda progreso de sia teamo, kiu estis trejnata laŭ la nova regularo en la daŭro de nur pli ol tri monatoj.

Fine s-ro Ĝang diris, ke la ĉinaj sportistoj, kiuj partoprenis en tiu

ĉi turniro, ne estas la plej esperiga rezerva forto. Oni trejnos elstarajn gimnastojn por la venontaj Olimpiaj Ludoj.

Jam finiĝis la printempa ekskurso. La sportistoj kaj trejnistoj lasis sur la bela Tajhu-lago siajn ĝojon kaj penson de la tuta tago kaj forveturis suden per trajno.



jŭan, Ĝinjŭan kaj Jŭantoŭĝu ĉe akvo kaj montoj kunfandiĝis kun la naturo kaj karakteriziĝas per sia originala aspekto.

La fama ĉina poeto Gŭo Mo-ĵo prikantis en sia poemo:

*Plej bela la Tajhu-vidaĵo  
ja estas Jŭantoŭĝu-pejzaĝo*

Jŭantoŭĝu sin trovas 16 kilometrojn okcidente de la urbo. Tie oni povas ĝui belajn pejzaĝojn de suda Ĉinio, kiel plaŭdanta akvo kaj maro da disvolviĝantaj ĉeriz-

floroj ĉe Ĉangĉun-ponto, rigardi antikvan ĝardenan arkitekturon, kiel Songfentang kaj Mudan'ŭ, aŭskulti sonoradon de sonorilo en la miljara templo Gŭangfu kaj stari antaŭ la pompa Ĉenglanhalo por de alte rigardi blankajn velboatojn sporade moviĝantajn sur la vasta lago kaj birdojn flugantajn super la akvo. Tie oni povas ankaŭ veturi en kanoto kun ornamaj drakoj kaj feniksoj. Veturante oni povas frandi freŝajn fruktojn kaj bongustajn

pladojn preparitajn de ŝipistoj. Pro tio nemalmultaj eksterlandaj turistoj diris: "Kiu ne gustumas tian ŝipistan pladon, tiu vane vizitas Tajhu-lagon." De Jŭantoŭĝu oni povas traveturi per ŝipo la lagon por iri al la ĝardena urbo Hangĝoŭ.

Lijŭan, ses kilometrojn for de Jŭantoŭĝu, estis ermitejo laŭdire de Fan Li, altranga kortegano de Jŭe-regno en la lasta periodo de Printempo kaj Aŭtuno en la kvina jarcento a. K., kaj Ŝjiŝi, unu el la kvar belulinoj de la antikva Ĉinio. Eble pro tio la parko ricevis la nomon (jŭan signifas parkon, ĝardenon). Tie estas vidindaj kvar kioskoj kun la nomoj de kvar sezonoj, 300-metra portiko uzata por rigardi la pejzaĝon de la lago kaj alta Ĉunĉiŭ-turo.


Mejjŭan estas fama ĉina umefloro. Umefloro estas la urba floro de Uŝji. En Mejjŭan kreskas pli ol 4 000 tiaj florarboj de pli ol 40 specoj. Komence de marto la monteto de la ĝardeno vestiĝas per aromaj umefloroj, tial oni nomas Mejjŭan ankaŭ "ĝardeno printempon anoncanta".

La parko Ŝjihuj kun belaj montoj kaj klara akvo en la okcidenta antaŭurbo abundas je historiaj restaĵoj, inter kiuj estas Ĉunŝengĵan, monta roĵo, ĉe kiu trinkigis siajn ĉevalojn ĉefministro de Ĉu-regno Ĉunŝen en la Periodo de Militantaj Regnoj en la tria jarcento a. K., kaj la templo Hujŝan konstruita en la Sudaj Dinastioj antaŭ pli ol 1 400 jaroj, kie staras ŝtona kolono kun gravurita budhisma sutro kaj 600-jara prospera kaj ombra ginko kun alto de 21 metroj kaj trunka diametro de 1.91 metroj. Ĉe la piedo de Hujŝan-monto en la parko estas la "Dua Fonto de la Mondo" ekŝprucinta en la oka jarcento, kies dolĉan akvon oni

*En la farbejo de la Hujŝan-a Farejo de Argilaj Homoj*



*Pejzaĝo de Tajhu-lago*



tributis siatempe al la imperiestra familio. Supre de la fonto pompas la antikva konstruaĵaro Junĉjiloŭ. Starante sur ĝi, oni povas ĉirkaŭpreni per la rigardo la ravan, pentrindan pejzaĝon de la parko. Ĝjiĉang-ĝardeno okcidente de la parko estas eleganta ĉina klasika ĝardeno ĉe montpiedo. Imitante ĝian stilon, oni konstruis Ŝjeĉju-ĝardenon en la Somera Palaco de Pekino.

Estas tre agrable turisme veturi per ŝipo laŭ la antikva Granda Kanalo en Uŝji. La 1 782-kilometra kanalo komenciĝanta de Pekino en nordo kaj finiĝanta en Hangĝoŭ en sudo markas la civilizacion de la antikva Ĉinio. Ĝi havas longon ĉ. 22-oblan al tiu de la Panama Kanalo kaj 11-oblan al tiu de la Sueza Kanalo. Kiam turistoj ŝipveturas laŭflue en la Granda Kanalo per ŝipo farita imite al tiu por imperiestro, iliajn okulojn frapas la ambaŭbordaj florantaj persikarboj kaj salikoj intermiksitaj, antikvaj loĝdomoj kaj viglaj riz-bazaroj, antikvaj ŝtonaj arkaj pontoj kaj antikvaj pagodoj, kaj ilin interesas precipe la vivo kaj moroj de la loĝantoj ambaŭborde de la kanalo. La kanalo kun longa historio fosita en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno hodiaŭ ankoraŭ multe servas al trafiko. Ĉiujare la lokon traveturas pli ol 200 000 ŝipoj, kaj meznombro unu floto post ĉiu dua minuto en tago. Estante tie, oni kvazaŭ vizitas la galerion de la antikva kaj nuntempa civilizo de Ĉinio.

En Ĝjangjin ĉe Jangzi-rivero pli ol 40 kilometrojn norde de Uŝji estas fama fuorto, la loĝejo de la antikva ĉina vojaĝisto Ŝju Ŝjake (1586-1641) kaj la turisma vilaĝo Hŭaŝji, kie turistoj povas rigardi laboradon en mezepoka vilaĝo, antikvan norion, pistadon per ŝtona pistujo kaj bovopaŝtado de knabo kaj ankaŭ labori, manĝi

kaj loĝi kune kun la kamparanoj por sperti la kamparanan vivon de suda Ĉinio. En Jiŝing okcidente de Uŝji oni povas viziti antikvajn metiejojn de fajencaĵoj kaj mirindajn karstajn kavernojn.


Uŝji estas urbo antikva tamen nove disvolvita. En la lasta periodo de Ŝang-dinastio antaŭ 3 000 jaroj Taj Bo fondis tie Goŭ'u-regnon. Liaj templo kaj tombo oriente de Uŝji, la palaco de princo Goŭ de la Okcidenta loko. Pro tio la urbo estas konata kiel "Malgranda Ŝanhajo".

En Uŝji turistoj povas pasloĝi en ĝardenaj hoteloj, kiaj Ĝinjŭan, Tajhu, Ŝujŝiŭ kaj Hubin. La Plezurŝipa Kompanio por Ekstera Kontaktiĝo en la urbo estas entrepreno kun 30-jara sperto en akcepto de gastoj. Estas gustoplemaj ĝiaj grandaj porturismaj drakoŝipoj sur Tajhu-lago kaj "imperiestraj" ŝipoj sur la Granda Kanalo. Por akcepti eksterlandajn gastojn, la turismaj institucioj de Uŝji ĉiujare aldonis iujn novajn servojn kun loka koloro, kiel saniga vojaĝo, fiŝhoka vojaĝo kaj aŭtunmeza lunoĝuo sur Tajhu-lago.

Iuj fremdlandanoj vizitintaj Uŝji admiris ĝin: "En Ĉinio oni

Ĝin-dinastio en Jiŝing, sutra steleo de Tang-dinastio en Ĝjangjin kaj Donglin-akademio de Ming-dinastio en la urboparto de Uŝji montras, ke jarmilojn tiu antikva urbo travivis. En la lasta jarcento Uŝji fariĝis unu el la kvar centroj de rizo en Ĉinio. Nun ĝi havas 3.89 milionojn da loĝantoj kaj estas industrie plimalpli perfekta urbo kun tekstila, elektronika kaj preciz-maŝina industrioj kiel la ĉefaj, kaj ankaŭ ekster-komerca bazo kaj turisma frandas prefere en Kantono kaj ankaŭ en Uŝji." En Uŝji oni povas ĝui, krom la pladoj preparitaj de ŝipistoj el akvoproduktoj de Tajhu, ankaŭ la hotelajn pladojn kun loka gusto, kiĉl porka ripaĵo kaj vaporumita haringo. Interesitoj povas frandi ĉe stratoj fabkazeon, huntunon kaj vaporumitan farĉitan farunaĵon, aŭ aĉeti materialojn en foiro por mem prepari ĉinajn pladojn. En kaj ekster la lando renomiĝis la silkaĵoj de Uŝji kaj la fajencaĵoj de Jiŝing. La argilaj homoj de Hujŝan estas tre bonvenaj turismaj memoraĵoj, precipe la ridmiena argila bebo Afu simbolanta feliĉon kaj kontenton. Se ili aperas en viaj sideo-kaj legoĉambroj, ili certe vekos vian belan rememoron pri via vojaĝo en Uŝji.


*Kupra skulptaĵo allogas vizitantojn.*





*La urbo Uşji ĉe Tajhu-lago*

*Sur Tajhu-lago*




*Sur la Granda Kanalo*



*Turistoj vizitas la  
Hujŝan-an Farejon  
de Argilaj Homoj.*



*En la pu  
Jŭantoŭĝe*



*Bongustaj pladoj preparitaj  
el akvoproduktoj de Tajhu*

Foto de LU BINGJONG






# Pentraĵoj de Jiĝjun-aj Kampanoj

de CAŬ BAJLONG

*Paŝtado de kaproj*  
de TJAN JALI



*Fiŝoj naĝas inter lotusoj*  
de FENG ŜIUJONG

*Paŝtado de ĉevaloj*

de ŜIU ĈING KAJ ŜJANG U




La kamparanoj de Ŝenŝji-provinco, norda Ĉinio, amas la artojn papertondi, brodi kaj pentri. Iliaj verkoj estas rimarkindaj en la kampo de popolaj belartoj de Ĉinio. Antaŭ nelonge iliaj pentraĵoj estis eksponataj en Pekino, kio altiris al si atenton de la belartista rondo.

La pentraĵoj estas modestaj, simplaj, naturecaj kaj romantikaj, kun forta etoso de vivo. La verkoj, asimilintaj la stilon de la popolaj papertondaĵoj kaj koloruzon de brodarto de norda Ŝenŝji, karakterizas sin per la stilo de la tradicia ĉina arto. La verkoj evidente montras, ke ili originas el la koloraj pentraĵoj sur argilaĵoj de la primitiva socio de Ĉinio (antaŭ 4 000 — 5 000 jaroj), desegnoj sur la bronzaĵoj de Ŝangkaj Ĝoŭ-dinastioj (la 16-a jc. a.K. — 771 a. K.) kaj surroke ĉizitaj bildoj de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.).

La plej allogaj estas plurvizaĝaj homoj kaj bestoj kun diversaj mienoj. Ekz., la pentraĵo “Ĝjang Zija Fiŝhokas” estas farita skize kaj modeste. Ĉe unua vido ĝi ŝajnas unuvizaĝa, sed post pririgardo oni trovas, ke la vizaĝo montras tri malsamajn mienojn. Rigardate de flanko, la vizaĝo de la maljunulo Ĝjang estas streĉa pro tio ke en la komenco li timas

Simioj  
frandantaj  
persikojn  
de ĜANG  
CAJHŪA



malsukceson en fiŝhokado. Rigardate fronte, la vizaĝo estas ĝoja, ĉar fiŝo proksimiĝas al la hoko. Kaj fine rigardate de la alia flanko, la vizaĝo estas ridanta, ĉar la fiŝo jam estas hokita.

Sur la pentraĵo “Ĉevalido-paŝtado” vidiĝas nur unu infaneto, rigardate de fronte, sed oni povas trovi tri figurojn, se li rigardas de dekstre, de maldekstre kaj fronte. La knabo ĉe la maldekstra flanko manĝigas al ĉevalido verdan herbon kaj la knabo ĉe la dekstra staras kun bildo de ĉevalido en la mano, dum la dukapa ĉevalo manĝas herbon kun la kapoj skuigantaj kaj malsamaj. Nelimigite de la koncepto de tempo kaj spaco, la aŭtoro libere spegulas la vivon. Similaj

plurkapaj homoj kaj bestoj videblas en la surroke ĉizitaj bildoj de Han-dinastio. La aŭtoroj de Jiĝjun-pentraĵoj ja heredas tiun pikturon.

“Knabineto kun Hartuberoj”, “Fiŝo kaj Lotusoj” kaj “Simio Manĝas Persikojn” estas nuptaj ornamaĵoj de la kamparanoj de norda Ŝenŝji. La verkoj montras primitivan moron de naskokulto. Fiŝoj kaj simioj en tiuj bildoj simbolas virojn, kaj persikoj kaj lotusoj virinojn. La signifo de la pentraĵoj estas prosperiĝo de la idoj.

La aŭtoroj de tiuj pentraĵoj plejparte estas virinoj, kiuj aĝas 16-74 jarojn. Parto de tiuj verkoj estis eksponataj en Francio kaj Usono.

Ĝjang Tajgong hokas fiŝon.

de U HŪANGŜANG



Kokobredado

de ŬANG SIŬCING



# MATEMATIKISTINO, DOMMASTRINO KAJ "SEKRETARIINO"

de ĜANG ŬEN



*Profesorino Hu Hešeng (meze) kaj esplor-studentoj*

Oni diras, ke matematikisto estas enkarniĝinta inteligenteco. Dank' al tia distingiga inteligenteco kaj diligenta laboro, Hu Hešeng malkovris misteron en la matematika mondo kaj fariĝis elstara matematikistino de Ĉinio. Hu Hešeng estas profesoro de la matematika instituto kaj estro de la institucio de geometrio kaj algebro de Fudan-universitato en Ŝanhajo. Pro la sukcesa esploro

de la Kampoj de Yang-Mills, ŝi, ŝia edzo profesoro Gu Ĉaŭhaŭ k. a. estis honoritaj per la ŝtata naturscienca premio, la plej alta premio por esplorado de la natura scienco de Ĉinio.

## "PRIPENSEMA HEROINO"

Hu Hešeng estis la unua esplor-studentino elkulturita de fama ĉina matematikisto profesoro Su Buĉing post la Liberiĝo.


En la komenco de la kvindekaj jaroj, la sekvantan jaron post kiam ŝi fariĝis esplor-studentino, ŝi unuope verkis la disertaĵon pri diferenciala geometrio kun originalaj vidpunktoj, kio estis alte taksita de la matematikaj rondoj. Post tio, ŝi publikigis pli ol 40 disertaĵojn en "Ĉina Scienco", "Ĉina Bulteno de Matematiko" kaj famaj eksterlandaj matematikaj gazetoj. Jen estis drama historieto pri la esplorado de la Kampoj de Yang-Mills.

En 1974 ĉindevena usonano, fizikisto doktoro C. N. Yang faris akademian raporton en Fudan-universitato. Kvankam lia teorio pri la Kampoj de Yang-Mills estis profunda kaj originala, tamen la instruistoj aŭskultis lin kun granda intereso. D-ro Yang estis tre kontentaj pri tio. Li demandis: "Ĉu vi komprenas min?" "Jes." Tiam iu mezaĝa instruisto, sidanta en la antaŭa vico, ekstaris kaj humile diris: "Iuj lokoj en la raporto povus havi matematikajn esprimojn." Tio mirigis Yang. Li atente aŭskultis lian parolon kun rideto. Post la raporto li diris, ke estas ekster lia atendo, ke en la universitato oni tiel profunde komprenas lian esploraĵon. Poste li sciigis pri la nomo de tiu instruisto. Li nomiĝas Gu Ĉaŭhaŭ. Mirigis lin ankaŭ alia afero. Kelkajn tagojn post lia raporto, iu instruistino deklaris, ke ŝi solvis iun problemon prezentitan de li en la raporto. C. N. Yang estis tre ĝoja kaj tuj notis la novan



esploran frukton kaj la nomon de Hu Heŝeng. Li kun emocio diris: "Estas neatendite, ke en Ŝanhajo estas tiel granda matematika forto kaj tiel pripensema heroino!" En la postaj kelkaj jaroj Hu Heŝeng partoprenis en la esplorado fare de C. N. Yang kaj Gu Ĉaŭhaŭ pri la matematika strukturo de la Kampoj de Yang-Mills.

En 1980, Hu Heŝeng akiris brilan sukceson en esplorado de la Kampoj de Yang-Mills. La disertaĵo pri la Kampoj de Yang-Mills, verkita de ŝi mem kaj publikigita en la "Kexue Tongbao" (Scienca Bulteno), vekis la atenton de la fama usona fizikisto prof. S. Deser. Li skribis al C.N. Yang kaj multe laŭdis la esploraĵon de Hu Heŝeng. Li opiniis, ke en la nuna mondo ŝi la unua trovis senkontinuecon en la klasika nivelo de la kampaj teorioj. Tiu grava eltrovo estas unu el la gra-



*Profesorino Hu Heŝeng (dekstre)  
kaj profesoro Gu Ĉaŭhaŭ*

vaj enhavoj en la esplorado de la Kampoj de Yang-Mills, kiu ricevis la ŝtatan natursciencan premion.

Post nelonge, kunlaborante kun angla sciencisto, profesoro S. Deser faris konkludon tute saman kiel tiu de Hu Heŝeng. Ankaŭ li verkis disertaĵon, en kiu li refoje esprimis sian komenton pri la konkludo en Hu Heŝeng. Krome, li skribis al Hu: "Ni publikigos nian artikolon en la sama gazeto en kiu estis publikigita la via." Kaj li vere sendis sian artikolon al Ĉinio kaj publikigis ĝin en "Kexue Tongbao"

### **"KIU NE AMBICIAS LA UNUAN LOKON, NE ESTAS BONA LERNANTO"**

En la mezlernejo Hu Heŝeng estis maldika, ĝentila kaj ŝajne tute neinteligenta. Sed ŝi estis superema kaj progresema. En la elementa lernejo ŝiaj lernonotoj estis la plej bonaj. Ŝi estis la unusola diplomito de la lernejo, kiu sukcese trapasis la eniran ekzamenon por la fama Ĉingŝin-a Virina Mezlernejo en Ŝanhajo. Ŝi interesiĝis pri ĉio. Ŝi volis akiri la unuan lokon en ĉiuj lecionoj, kiel matematiko, fiziko, kemio, literaturo, pentrado kaj muziko.



*Hu Heŝeng  
en kaligrafado*

Ŝi diris: "Kiu ne ambicias la unuan lokon, ne estas bona lernanto."

Pro sia malforteco ŝi devis frue enlitiĝi ĉiuvespere kaj ne povis legi ĝis profunda nokto kiel aliaj. La ununura efika metodo por ŝi estis kun grandega atento aŭskulti dum lecionohoroj kaj kapti ĉiun minuton por fari hejmtaskon kaj relerni instruitajn lecionojn. Post nelonge, la instruisto pri matematiko diris, ke ŝi rapide progresis en matematiko. En iu matematika ekzameno al la triaklasaj lernantoj Hu Heŝeng gajnis la plej altajn notojn en siaj du demandoj, dum du trionoj de la lernantoj ne sukcesis en la ekzameno pro tre malfacilaj demandoj.

Ĝuste dank' al tia energio de la volo kulturita denaske, la matematikistino dum dekoj da jaroj senĉese konkeris sciencajn montpintojn unu post alian.

En 1958 Hu Heŝeng esploris elastan meĥanikon kaj ĝian utiligon. En la sekvanta jaro ŝia edzo Gu Ĉaŭhaŭ revenis al la patrio, fininte perfektigan studadon eksterlande, Hu Heŝeng deprenis de li la esploran temon de diferenciala geometrio. La diligenta esplorado pri tiuj flankoj ebligis al ŝi akiri gravan esploran frukton en la mezo de la sesdekaj jaroj. Post profunda esplorado ŝi finfine trovis apartan metodon determini la breĉojn de la grupo de moviĝoj de Riemannian. Tiu frukto estis akirita 10 jarojn pli frue ol tiu de la samspeca esplorado en la mondo (usona MANN, 1976).

Tio edifis ŝin, ke kreado bezonas ne nur firman volon, sed ankaŭ diversflankajn sciojn. Tio postulas de ŝi tempon. Por la sciencistoj la plej valora estas tempo. Kion tio signifas por la dommastrino-matematikistino?

## PEZA ŜARGO

La geedzoj Gu Ĉaŭhaŭ kaj Hu Heŝeng ambaŭ estas famaj matematikistoj de Ĉinio. Ili estas avaraĵoj je sia tempo en dommastrumado. Kelkiam ili studis aŭ laboris ĝis profunda nokto, kaj Hu Heŝeng pro zorgo de la sano de sia edzo volis prepari iom da manĝaĵo por li. Li ĉiam admonis: "Lasu! Ŝparu tempon!" Ilia solinfano studas en universitato kaj Gu Ĉaŭhaŭ estas tre okupita. Tial Hu Heŝeng devas prepari manĝojn trifoje en tago, sed manĝpreparo estas tre simpla: aĉeti pretan manĝaĵon, aŭ prepari pladon da fritita legomo kaj bovlon da supo. Jen tiamaniere ili ŝparas sian tempon.

Ordinare, Hu Heŝeng plenumas ankaŭ rolon de 'sekretariino' de sia edzo. Gu Ĉaŭhaŭ ofte ricevas leterojn kaj kontribuajojn de siaj en- kaj eksterlandaj kolegoj kaj lernantoj, sed kiel akademiano de la Ĉina Akademio de Sciencoj, vicrektoro de Fudan-universitato kaj dekanato de ĝia matematika fakultato, li estas tre okupita, tial ŝi plenumas la korespondan laboron anstataŭ li.

Tiel, la matematikistino estas kaj dommastrino kaj privata "sekretariino" de sia edzo. Ŝi ĉiam sentas, ke mankas al ŝi tem-

po. Inter la studentoj instruataj de ŝi troviĝas kelkaj personoj, kiuj gajnis la unuan kaj duan lokojn en la tutlanda matematika konkurso de mezlernantoj, kaj inter la esplor-studentoj gvidataj de ŝi estas doktoro-kandidatoj kaj magistro-kandidatoj. Doni lecionojn al tiuj studentoj estas multe pli malfacile ol al ordinaraj studentoj. Hu Heŝeng profunde sentas sian grandan respondecon, ŝi do senĉese ĉerpas novajn sciojn por riĉigi la instruan enhavon kaj foje refoje konsideras kiel plibonigi sian instruadon. Ŝi ofte uzas eĉ pli ol dek horojn por bone prepari unu lecionon.

Dum ŝi portas la pezan instruan taskon, ŝi ankoraŭ persistas en scienca esplorado kaj esploras la harmoniajn mapojn en diferenciala geometrio. En la lastaj jaroj invitive ŝi partoprenis en la akademiaj konferencoj okazintaj en Usono, DR Germanio, FR Germanio, Francio kaj Italio kaj faris pli ol dek lekcionojn, kio estis taksata kaj laŭdata multe. Ŝia 42-a disertaĵo pri harmoniaj mapoj en diferenciala geometrio jam estis publikigita en akademia gazeto de FR Germanio. Tamen Hu Heŝeng ne kontentiĝis pri tio kaj pretas grimpi al nova alteco.



# KIEL ĈINIO TRAKTAS JUNAJN KRIMULOJN?

de ĈJIGONG

Ŝju Ĉiŭ, kiu iam ŝtelis kaj hazardludis, estis tre danko al la junula pundomo de la urbo Suĝoŭ en Ĝjangsu-provinco, kiu reedukis lin. Liberigite, li interkonsiliĝis kun sia fianĉino kaj decidis okazigi sian nupton en la pundomo.

Ilia geedziĝo estis aranĝita antaŭvespere de la Printempa Festo. Ĝin ĉeestis multaj gastoj, inkluzive de iliaj parencoj kaj amikoj, kursanoj kaj instruistoj de la pundomo kaj krimintaj junuloj antaŭlonge liberigitaj.

Ŝju Ĉiŭ aĝas 26 jarojn. Li pasigis du kaj duonan jarojn en la pundomo. Pro bona konduto en 1982 li estis liberigita je duonjaro antaŭ la templimo.

“La pundomo donis al mi novan vivon,” li diris, “por mi tio estas tre grava, tiel ke mi decidis okazigi mian edziĝan ceremonion ĉi tie.”

Jam pasis unu kaj duona jaroj, de kiam li revenis al sia antaŭa bicikla fabriko. Liaj kolegoj laŭdis, ke nun Ŝju Ĉiŭ kondukas tute alie.

“En Ĉinio estas ankoraŭ nemalmultaj tiaj junuloj, kiuj transformiĝis en novajn homojn dank’ al edukado en la pundomo,” diris profesoro Ju Ŝutong, direktoro de la Eduka Departemento sub la Ministerio de Justico de la Ĉina Popola Respubliko. Li diris, ke pli ol 80% de la junuloj, liberigitaj de la pundomo, tute aŭ parte korektis sian kulpon.


Ĉinio havas miliardon da loĝantoj, inter kiuj 274 milionoj havas aĝon de 14 ĝis 28 jaroj.

*Post sia liberiĝo el pundomo Ŭan Pejĉing (meze) laboras en la Nankina Sekcio de Fervoja Pasaĝer-trafiko. Ŝi estis elektita kiel plej bona servistino kaj modela juna laborantino.*





*Edukisto interparolas kun kriminta junulo en pundomo.*



*Krimintaj junuloj faras poŝtmarkajn albumojn en pundomo.*

Inter la junuloj la krimuloj en 1979 konsistigis 0.057%. Ĝi estas malaltprocenta kompare kun tiu de aliaj landoj.

“Tamen,” li diris, “se kompari tiun kun la procento en la 50-aj jaroj, ĝi kreskis rimarkinde.” Li diris ankaŭ, ke iuj el ili estas kruelaj krimuloj, ekz. hommortigo, prirabado kaj banda seksatenco.

Ju Ŝutong atribuis tion al la “kultura revolucio” inter 1966-1976. Li diris, ke dum la dek-jara ĥaoso de la “revolucio” la

lernejoj estis fermitaj, labordonado frostigita kaj la junuloj ne ricevis prizorgon kaj edukadon. Li opiniis, ke la fino al la kultura revolucio ne signifas konscian ĉesigon de la krimado de junuloj. Por solvi la problemon necesas longa tempo.


Li montris ankaŭ, ke la malbona influo de la okcidenta dekadenca kulturo, kiaj pornografio kaj erotikaj video-bendoj kontra-banditaj en Ĉinion, estas unu el la gravaj kaŭzoj de la junula krimado. Antaŭ nelonge oni faris enketon al junaj krimuloj de

Ŝanhajo. La rezulto raportis, ke 70% de la knaboj kaj 90% de la knabinoj krimis pro la ekscito de pornografio kaj videoj.

Laŭ la opinio de Ju, la junula krimado estas sinteza manifestiĝo de diversaj sociaj problemoj. Tial por solvi ĝin oni devas alpreni sintezan traktadon. Serio da rimedoj alprenitaj laŭ la principo en la lastaj jaroj akiris rimarkindan sukceson, kio estas alte takсата en- kaj eksterlande.

Ju diris, ke la sinteza traktado signifas mobilizadon de diversaj

*Cen Dangjan (dekstre) ellernis kudradon en pundomo. Post sia liberiĝo ŝi starigis la vestofarejon “Procelario” kaj pro tio ricevis laŭdon de loĝantoj.*



rondoj en la socio, inkluzive de instruistoj, gepatroj, virina federacio, laborista sindikato kaj loĝkvartala komitato kaj ankaŭ oficistoj de juĝistaj kaj publiksekurecaj rondoj, por kune fari edukadon, admonadon kaj reformadon al la krimuloj. Kompreneble, la laŭleĝa puno estas necesa, sed ĝi estas destinita nur al la tre malmultaj, kiuj faris seriozajn krimojn kaj estis kondamnendaj.

Laŭ la supre menciita principo Ĉinio alprenis multajn rimedojn kontraŭ la junula krimado en la pasintaj 4-5 jaroj.

La knabaj deliktuloj estas ĝenerale senditaj al labora-studa lernejo. Nuntempe en Ĉinio estas 112 tiaj lernejoj kun 6 200 lernantoj en la aĝo inter 13-18 jaroj. Oni ne devas fermi ilin en pundomon, sed pro sia delikto ili ne povas daŭre lerni en la antaŭa lernejo.

Sun Dongtang, oficisto de la eduka ministerio, kiu respondacas pri la labora-studaj lernejoj, diris, ke tia lernejo celas reformi la junajn deliktulojn. En la lernejo oni donas al ili lecionojn de mezgrada lernejo kaj laborigas ilin en la fabriko aŭ kultivejo sub la lernejo, por ke ili post 2 aŭ 3 jaroj revenu al la antaŭa lernejo aŭ la socio kiel bonaj lernantoj kaj civitanoj.

Depost 1976 pli ol 12 600 lernantoj diplomiĝis el tiaj lernejoj, nur 2-5% el ili denove deliktis. Multaj el ili nun fariĝis studentoj, spertaj laboristoj kaj iuj eĉ estis elektitaj kiel labormodeloj aŭ laborejestroj.

La 16-18-jaraj krimuloj estas senditaj al junula pundomo. Tie oni donas al ili lecionojn kaj laboron same, kiel en labora-studa lernejo, sed ili devas strikte observi la disciplinon kaj fari pli da fizika laboro. En la lastaj jaroj, dank' al edukado kaj refor-

mado en ĝi, nemalmultaj el ili fariĝis utilaj homoj de la socio.

Knabo Cuj Ĉingĉun estis edukita en la Pekina Junula Pundomo du jarojn pro serioza bandbatalo. Post kiam li estis liberigita en la fino de 1978, li revenis en la Pekinan Eksperimentan Kemian Fabrikon, kie li laboris antaŭ sia enfermiĝo. Pro lia bonkonduito en 1982 li estis honorita kiel modela laboristo de Pekino.


Estas multaj rimedoj por reformi kaj eduki la junajn kulpulojn. Inter ili la plej efika estas fari sinceran interparolon kun ili, kuraĝigi ilin en lernado kaj laboro, kaj aranĝi por ili kursojn

pri leĝo kaj leĝobservado.


Koncerne la zorgadon de la socio, ni parolas ĉefe pri vizitado al ili far registaraj oficistoj kaj pedagogoj kaj prezentado por ili far artistoj.

Foje 84-jara veterana pedagogo Sun Ĉingŝiŭ, kiu ofte rakontis historietojn en radio kaj televido, vizitis la Pekinan Junulan Pundomon. Komparante junajn kulpulojn kun infanoj falintaj en ŝtormo, li diris: "Nun vi estas 'malsanaj' kaj kuŝas en 'hospitalo'. Post kiam vi resaniĝos, vi ree estos bonaj infanoj kiel antaŭe." Liaj vortoj kortuŝis la geknabojn ĝis larmoj.

*En libertempo*



*Leciono en pundomo*



Kiam ili resaniĝas kaj revenas en la socion, ili estas daŭre helpataj kaj edukataj de iu speciala grupo el du aŭ tri volontuloj, ĝenerale instruistoj, emeritaj laboristoj aŭ pliaĝaj najbaroj. La grupo helpas ilin trovi laboron, sin prepari por enira ekzameno por meza aŭ alta lernejo. Ili faras ĉion eblan por evitigi al ili refojan krimadon.

Hodiaŭ tiaj grupoj establiĝis en preskaŭ ĉiuj bazaj laborunuoj en Ĉinio, kiuj ankoraŭ frontas kontraŭ la problemon de junula

krimado. Inter la grandnombraj volontuloj estas pli-ol-60-jara virino Lŭo Ĝinfeng, dommastrino en la gubernio Kunŝan de Ĝjangsu-provinco. En la pasintaj kvin jaroj ŝi helpis 35 kulpulojn adiaŭi sian pasintecon, inter ili 18 fariĝis labormodeloj, 4 fariĝis respondeculoj de fabrikoj aŭ funkciuloj de la bazaj registaraj instancoj, unu soldatiĝis kaj unu eniris en superan lernejon.

Kompreneble, por la sinteza traktado estas ankoraŭ iuj solvindaj problemoj. Laŭ Ĉi Ĝuang,

fakulo pri la ĉina junula krimado, la ĉefa problemoj kuŝas en tio, ke iuj pro malestimo al la kulpuloj, kiuj jam riparitis siajn kulpojn, ne volas doni al ili laboron, kio kaŭzas al ili malfacilaĵon vivi denove kiel honestaj civitanoj.

Li diris: "Por fari nian socion pli bela kaj por ke ĉiuj vivu feliĉe, la sinteza traktado devas inkludi la edukadon al ĉiuj membroj de la socio kaj kuraĝigon al ĉiuj por ke ili subtenu la edukadon, helpadon kaj reformadon al la junaj kulpuloj."

(Daŭrigo de p. 45)

per alia vorto — estas *supernatura* (marksismaj filozofoj eble tion nomus superstruktura). Kaj nenie mi vidas tion tiel klare, kiel en la naskiĝo kaj elvolviĝo de la lingvo. Kvazaŭ ŝajnas, ke, kiam oni inventas vorton, samtempe oni inventas ĝian signifon. Aŭ, male, kvazaŭ la bezono ion senti, la bezono enkonduki vivonuancon, postulus nekonfuzeban moduladon neniam antaŭe aŭditan, novan klopodon de la homa gorĝo.

La homo inventis diojn, dogmojn, kontraŭdirojn, neblaĵojn, fantomojn. La homoj inventis la koncepton, la enton de *tri personoj en unu*, por ke tiu koncepto preterpasu ilian propran racion kaj tiel ĝi pravigu ilian surgenuiĝon. Kristanoj kaj hinduoj nomas tion Triunuo en multaj lingvoj. Kiam pastroj ĝin eksplikas al siaj paroĥanoj kaj ili ekzemplas dirante, ke *kvin* fingroj konsistigas *unu* manon, la simpluloj fine komprenas la nekompreneblaĵon, ĉar la pastro eligis sonojn, kiujn ili konis. Tamen pli granda mistero ol la Triunuo estas, ke la

homoj, eligante bruojn, sin reciproke komprenas. Oni diris, ke vorto estas nur aero, aerblovo, kaj nenio pli: io pasema; io apenaŭ ekzistanta; io, kio ne pezas, ne odoras, ne saporas, ne tuŝeblas; nur aŭdiĝas. Kaj apenaŭ nur momenton. Kaj ĉio finiĝas.

Sed ne; tio ne estas vera. Ĝi ne finiĝas. Nu: ĉar la homo estis malkontenta esti supernatura, li fariĝis, iamezure, *kontraŭnatura*. Li atencis kontraŭ la konstanta renoviĝo de la naturo, kontraŭ ĝia ripetado, kontraŭ ĝia ĉiamdaŭreco farita el efemeraĵoj: li inventis la skribarton. Li donis fizikan aspekton, strekon kaj desegnon, al ĉiu silabo, al ĉiu fonemo, kaj li rapide sin ĵetis skribadi: siajn leĝojn, siajn historiojn, siajn heroaĵojn, siajn amojn, siajn ĝestojn kaj la ĝestojn de siaj gedioj, siajn sciojn, siajn preĝojn, siajn kantojn, siajn intencojn. Nenio estas malpli natura: nenio pli komplika. Tio estas la sola orgojlo, kiu eblas al verkisto — je tiel modesta kaj molesta ofico —, ĉar verkisto ne havas alian talenton, alian riĉaĵon, alian filon, ol la propran vor-

ton. Tio estas la sola fiero, kiu al mi eblas: ke tiuj ĉi malfacile kompreneblaj signoj presitaj morgaŭ estu legataj kaj asimilitaj de iu, kiu ne estas apud mi, de iu, kiu nek vidas nek konas min. Kaj, eĉ, ke tiuj vortoj estu legataj kaj asimilitaj de iu, kiu, en malproksima lando, ankoraŭ ne naskiĝis. Kiel iam rusoj, hungaroj, ĉinoj, japanoj legos tion, kion mi verkis en Esperanto. El tio naskiĝas mia espero je la homo. . . Kaj, samtempe, de tio venas mia malespero. Ĉar la vorto, kiu estas la unua semo de la rezonado kaj de la religio kaj de la arto kaj de la scienco, estas la komenca kaŭzo de ĉiuj ruiniĝoj, kiujn la homo — tiu apoteozita simio — povas provoki. Aŭ, eble, en alia okazo, antaŭ milionoj da jaroj, li jam provokis. Ĉar, kiu povas certigi, ke tiu ĉi nia historio estas la unua historio de la homaro? Neniu. Same kiel neniu povas certigi, ke tiu ĉi nia nuna historio estos la lasta. Aŭ ke ni multe prokrastos — aŭ prokrastos aliaj frenezaj simioj — rekomenci la historion. Ĉar la homo ankaŭ inventis la vortojn *bombo*, *milito*, *sensencaĵo* kaj *detruo*.

## MAGIAJO DE L' VORTOJ

*Amike dediĉita al Prof. Chen Yuan, leksikologo, kiu en Vanku-  
vero ĉarme parolis al ni pri ĉinaj vortoj kaj ĉinaj kaligrafaĵoj.*



Antaŭ nelonge, mi havis okazon trarigardi kelkajn volumojn, kiuj montris reproduktaĵojn de manuskriptoj admirinde kaligrafitaj en la araba, ĉina kaj japana lingvoj. Mi komprenis nenion el la signifoj, kiujn la kaligrafaĵoj reprezentis; mi komprenis nenion el tio, kion tiuj amasoj da ritmo kaj belo subtenadis. Min ade kaj ree surprizis ilia beleco: beleco vehikla, vikaria, anstataŭa, sed samtempe, tiel brokita kaj tiel svelta. Sartre asertis, ke oni estas verkisto, ne ĉar oni decidis verki, sed pro la maniero, kiel oni verkas. Kompreneble Sartre aludis beletran esprimadon, la formon

en kontrasto kun la ideo. Tamen oni povus, en tiu ĉi okazo de la kaligrafaĵoj, plivastigi ankoraŭ pli la metaforon: ĝis la formo de la formo. Jen estas laodoro de la rozoj; jen ankaŭ la rozo; jen, fine la vazo, kiu tenas la rozon. Oni atingas momenton, kiam oni ne plu scias, antaŭ la melodia baroko de kaligrafaĵo, je kio konsistas la verkarto. Dum tiu librotrarigardado, mi sentis kvazaŭ mi sidus kontraŭ impone miriga templo, orita kaj arĝentita, al kiu oni ne permesus al mi eniri, kaj mi devus resti ekstaze gapanta antaŭ ĝi. Kaj mia nesciado — ĉar nesciado estas tio, kio al ni baras eniri kien ajn — blokanta al mi ĝian plenan riĉon, la lastan sekreton: la komprenon. . . . Iam oni tradukis unu mian eseon en la rusan lingvon; alia eseisto faris la miraklon eniri en mian esperantistan hejmon — eble tio estas traduki — kaj malfermi ĝian pordon al tiuj, kiuj scipovas legi ruse. Kaj mi — denove pro nesciado — devas fidi je tio, ke la tradukinto bone vidis mian hejmon kaj ke li sciis ĝin montri tia, kia mi ĝin aranĝis. . . . Kiel povas verkisto ne pripensi tiam kaj tiam, la misteron de la lingvo?

Frenezaj simioj, kiu havis anormala grandan cerbon, malkovris, ke lia gorgo kapablas eligi malsamajn sonojn. Jen la homo. Tio distingas la homon. Tio faras la homon. Kio venos poste, tio estas kontingenco. La homo estas besto, kiu parolas; besto, kiu konscias sian propran vivon, kaj tion esprimas. Kiel ne senti sin premita de la zorgoplena prodiĝo, laŭ kiu gento, klano, grupo, pacienco, kun milionoj da jaroj post si, interkonsentis, ke tiu sono indikas tian objekton: izolita bruoj, fajron; du bruoj, fulmotondron; aliaj malsamaj bruoj, aŭ ĉason, aŭ printempon, aŭ morton, aŭ kareson. Eble iu diros, ke la bestoj sin interkomprenas, kaj eĉ pli bone ol la homoj. Eble iuj diros, ke ekzistas inteligento en la blinda obstinado de la formikoj, en la geometrio de la abeloj, en la abeloj, en la kopulacio de la birdoj. Mi ne scias. Tion mi ne negas. Sed ili obeas la leĝojn de la naturo, ili sekvas siajn instinktojn: ili ne improvizas. Kaj se estiĝas ia mutacio, ĝi estas tiel infinite malrapida, ke ili eĉ ne perceptas ĝin. Sed la homo — mi ne scias tion diri alimaniere, esprimi

(Daŭrigo sur p. 44)

# En pluvfadenetoj

(Mikronovelo)

Verkita de JU BIN

Esperantigita de ŬANG LIŬ

De sur mia balkono mi povis vidi malproksime ĉe la vojforko malaltastaturan magran emerito-masoniston sin apogantan sur lambastono. Li senĉesé pridemandis la preterpasantojn por trovi la homon, kiu biciklante faligis lin sed tuj fuĝis. Pasis pluraj tagoj, neniŭ sukcesis admoni lin reveni hejmen. Iom post iom li fariĝis por mi malagrabla eĉ pli ol tiu, kiu lin faligis. Certe en la mondo troviĝas maliculoj, tamen nobluloj ne devas esti venĝemaj.

Estis pluveta vespero. La subiranta suno malantaŭ la kurteno de pluvfadenetoj verŝis buntajn rebrilantajn makulojn sur la profundan, modere oblikvan straton malpuran de olemakuloj. En la kvietaj stratetoj sporade vidiĝis kelke da ombreloj similaj al floroj. Brako en brako, apud mia edzo, mi staris ĉe la vojforko tenante ombrelon en la mano. Ĉe la fino de la strateto simila al celtabulo alternis ruĝa kaj verda lumo de semaforo. La plumba pinaklo glimbrilis en pluvfadenetoj. "Iru tiun vojon al la siringo, kiun ni plantis pasintjare memore al nia geedziĝo," mi proponis al la edzo hezitanta en elekto de vojo. "Kaj eble vi persvados la maljunan obstinulon. En pluvo homo estas facile persvadebla."

"Ho, jes. Ho, kioma horo?"

"Ve, haltis la horloĝo. Kaj kie via horloĝo?"

"La mia riparata. Ha, pluvo sen horoj fariĝas pli poezia," li diris ebrie. Li etendis sian manon kun montrofingro ŝveliĝinta.

"La fingro timas pluvon," mi repuŝis lian manon. "Daŭrigu deklamadon de via poemo 'Pluvfadenetoj'."

Facila aerblovo flankenmovis la ombrelon kunportante pluvfadenetojn. En la pluvnebulo aperis homo sur lambastono. La edzo turnis rigardon al mi kaj diris kun dolĉa rideto: "Vidu, la

pluveroj falas sur vian kapon." Li puŝis super min la ombrelon, kiu kiel lotusfolio, ŝirmis min. Mi ne povis vidi ĉion sur la strato kaj nur aŭdis la leĝeran pluvan ritmon pulsantan en la siblado de pluvo, kio impresis al mi, ke la malseka strateto ien stumblis. Ta, ta, ta, la brueto de mia paŝado sur la ŝtona strateto, la frapetado de pluvgutoj sur la ombrelo miksiĝis kun la softa deklamado de lia poemo:

". . .

Mi voluntas esti pluvfadeneto,

Por esti teksita en nebulan gazon.

Per ĝi kovru la maldikan strateton

Kaj vualu vian mornan vizaĝon

. . ."

"Pardonon, kamarado, kioma horo nun?" raŭka, laca kaj Siĉŭan-dialekta voĉo rompita la dolĉan deklamadon de la edzo.

Mi reciprokis rideton kun mia edzo.

"Proksimume kvarono post la sesa," mi respondis en malkontento.

"Ne. Estas duono post la sesa," aŭdiĝis nekonzata voĉo.

En miro mi turnis min kaj vidis, el sub la ombrelo la abomenindan, misformiĝintan lambastonton sub la dekoloriĝinta mantelo. "Denove vi," mi altigis la ombrelon kaj ĵetis al li malestimman rigardon, dum li fiksis la strangan rigardon sur mian teneran edzon. "Finfine mi trovis vin." Sur lia malseka pala vizaĝo flagretis ĝoja rideto. Sible spiradis la maljunulo.

"Ĉu vi miskonis min?"

"Ne, mi ne eraris," la tono estis trankvila, sed kategoria.



“Vidu, li prenis min por tiu,” mia edzo ride-  
tis.

En kolero mi ekiris tirante la edzon.

“Ne, li bezonas konsolon kaj simpation,” la  
edzo deŝiriĝis de mia mano, proksimiĝis al la mal-  
juna masonisto por apogi lin, transprenis el mia  
mano la ombrelon kaj ŝirmis lin per ĝi. Subite  
mia brulanta vizaĝo kvazaŭ eksentis, ke ankaŭ la  
pluvfadenetoj estis varmigitaĵoj de lia korpo. Tamen  
la maljuna masonisto diskrete forpuŝis mian edzon,  
kaj lia malseka, serena vizaĝo fariĝis melankolia



kaj malhela. Li disvolvis la krudan sunbrunan  
manon kaj en la mankavo aperis brila svisa brak-  
horloĝo — ‘Ho’, mi ekkriis de surprizo.


“Mi trovis ĝin ĉe la borderaĵo de la strato,  
kie vi faligis min. Ĝi estas via, jes, via.” Li diris  
en softa voĉo, enmanigante la brakhorloĝon al  
mia edzo. En la profundaj orbitoj flagris du  
faskoj da lumo modera sed korbatica. Liaj dikaj  
lipoj konvulsie moviĝetis defluigante la pluvakvon  
ĉe la lipoj. Li volis diri ion, sed longe murmure-  
tis kaj nenion diris, nur dolore skuis la kapon. . .

Li trenis sin for.

. . . Li, malaltastatura, sternis gigantan  
ombron post si. La ombro forŝovis la ĉarmajn  
lumojn, per kiuj la subiranta suno kovris la stra-  
ton en pluvo, kaj kolorigis la straton per violeta  
koloro, kiu faris la straton klara kaj pura. Diki-  
ĝantaj pluvfadenetoj, saturitaj de amara kaj ad-  
stringa odoro de ŝimaj siringaj folioj ruiniĝintaj,  
vipis mian lacan korpon kaj sentigis al mi agra-  
blan malvarmeton. Pluvfadenetoj rompis la du  
ĉarmajn vizaĝojn respegulitajn en la akvo sur la  
strato. Mi abrupte forpuŝis la tremetantan om-  
brelon super nia kapo kaj postkuris la malgran-  
dan staturon, stumble paŝantan antaŭen en la  
pluvfadenetoj. . .



## KARIKATURO



# BUDHISMO EN ĈINIO

de LAN ŜAN



Gaŭ Puĉu

En Ĉinio estas pluraj religioj, el kiuj budhismo havas la plej grandan influon sur la ĉinan popolon.

Proksimume en la 1-a jc. budhismo estis enkondukita en la hanajn loĝregionojn de Ĉinio. La plej frua budhisma templo en Ĉinio estas la templo Bajma en Lŭojang (bajma en la ĉina lingvo signifas blankan ĉevalon). Legendo diras, ke en 6 p. K. hinda bonzo venis de la Okcidenta Regiono al Lŭojang kun budhismaj sutroj portataj per blanka ĉevalo kaj tie konstruigis la templon, pro tio la templo ricevis la nomon. Tiel do ekaperis la unua

budhisma templo de Ĉinio.

Enkondukite en Ĉinion, budhismo rapide kunfandiĝis kun la ĉinaj tradiciaj ideologio kaj kulturo. En la dinastioj Ŭej kaj Ĝin (220—420 p. K.) budhismo populariĝis en sufiĉe vasta regiono kaj sin kombinis kun metafiziko, tiutempe tre populara filozofio. En la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420—589 p. K.), ĉie oni konstruis budhismajn templojn kaj ŝtonkavernarojn kaj tradukis sutrojn, kio markis la pluapaŝan disvolviĝon de budhismo. Budhismo atingis sian kulminon en la periodo de la dinastioj Suj kaj Tang (581—907 p.

K.). En la longtempa disvolviĝo ĝi, konfuceanismo kaj taoismo influis unu alian kaj iom post iom enradikiĝis en la feŭda socio de Ĉinio kaj fariĝis konsistiga parto de la superstrukturo.

Kun la disvastiĝo de budhismo, en la skolo mahajano estiĝis multaj sektoj, kiaj Sanlun Ĝingtu-, Faŝjang-, Ljuzong-, Tjantaj-, Hŭajan-, Ĉanzong-kaj Sekreto-sektoj. Ili ĉiuj havis siatempe multege da adeptoj en la ĉina historio kaj havis gravan influon sur formiĝon de liŝjŭe — la filozofian sistemon, kiu tenis regadan pozicion en la loĝregionoj de la hanoj de post Song-dinastio (960—

1279 p. K.). Kiam budhismo enkondukiĝis de Ĉinio en Koreion, Japanion kaj Vjetnamion, ĉinaj Ĉanzong-, Ĝingtu-, Tjantaj- kaj Sekreto-sektoj furoris en tiuj tri landoj. En la dinastioj Jŭan (1279—1368 p. K.), Ming (1368—1644 p. K.) kaj Ĉing (1644—1911 p. K.) budhismo iom post iom kadukiĝis.

Budhismo estis enkondukita ankaŭ en la regionojn de la nacimulplimulto de Ĉinio. De la 8-a jc. la hinda Sekreto-sekto miksiĝis kun primitiva tibeta religio kaj el tio formiĝis lamaismo. De la 15-a jc. lamaismo estis enkondukita de Tibeto en Siĉŭan, Ĉinghaj, Gansu kaj la Internan Mongolion kaj fariĝis religio de la tibetanoj, mongoloj, tu-oj, ĉjang-oj, pumi-oj kaj jugur-oj. Lamaismo profunde influis la historion, politikon, ekonomion, kulturon, morojn kaj kutimojn de tiuj nacimulplimultoj.

Proksimume en la 13-a jc. hinajano estis enkondukita de Birmo en sudokcidentan Ĉinion.

La taj-a, bulang-a kaj benglong-a naciecoj, kiuj loĝas en Junnan, akceptis ĝin kiel sian religion kaj sekve ĝi donis multflankan influon sur tiujn nacimulplimultojn en ilia socia vivo.


Kun la disvastiĝo de budhismo, budhismaj temploj kaj budhaj statuoj aperis preskaŭ en ĉiuj anguloj de la lando. Nun ĉie en Ĉinio troviĝas temploj kaj pagojoj. Mondfamaj estas la ŝtonkavernaroj Dunhŭang de Gansu-provinco, Jungang de Ŝanŝji-provinco kaj Longmen de Henan-provinco. Kun la antikvaj ĉinaj arkitekturaj strukturoj, formoj kaj stiloj la templaj konstruaĵoj servas kiel praktikaj atestoj por studi la ĉinan arkitekturan historion kaj estas valoraj kulturaj objektoj de nia lando.

Septembre de 1949 la reprezentantoj de la ĉinaj budhistaj rondoj ĉeestis la Unuan Sesion de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Kaj poste en la popolaj kongresoj kaj politikaj interkonsiliĝaj konferencoj de

ĉiuj niveloj estas reprezentantoj de budhistaj rondoj. Iniciatite de famaj ĉinaj bonzoj, en 1953 okazis la Unua Budhista Kongreso de la nova Ĉinio kaj fondiĝis la Ĉina Budhisma Asocio, ampleksanta la budhismajn organizaĵojn de ĉiuj naciecoj, lokoj kaj skoloj. Ĝiaj 2-a, 3-a kaj 4-a kongresoj okazis en 1957, 1962 kaj 1980. Banĉen Erdeni estas la honora prezidanto de la asocio kaj Ĝaŭ Puĉu — ĝia prezidanto.

En 1956 la Ĉina Budhisma Asocio fondis la Ĉinan Budhisman Instituton en la templo Fajŭan, Pekino kaj poste funkciigis ĝiajn filiojn en la templo Lingjanŝan de Suĝoŭ kaj la templo Ĉjiŝjaŝan de Nankino. La instituto estas supera lernejo de la ĉinaj bonzoj, kaj la bonzoj venintaj de diversaj lokoj tie lernas kulturajn sciojn, studas budhismajn historion kaj sutrojn. “Voĉo de Budhanoj”, eldonata de la Ĉina Budhisma Asocio, estas sin-teza revuo por esplori budhismon.

*Budhisma aktivado kun partopreno de majstroj el diversaj lokoj de Ĉinio*





La Ĉina Budhisma Asocio havas kontaktojn kun budhismaj organizaĵoj de dekoj da landoj kaj regionoj kaj ili vizitas reciproke por akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj budhistoj. Helpate de la ĉina registaro, la asocio ekde 1984 eldonas "Ĉinaj Budhismaj Sutroj" por profundigi la studon pri budhismo kaj akceli la internacian kulturen interŝanĝon.

*Lernantoj de la Ĉina Budhisma Instituto en leciono*

*Bonzoj murmuretas sutron.*



## La Lasta Flugo

Verkita de **GONG ŜJI**

Esperantigita de **LAŬLUM**

*Akiris jen liberon  
vundita aglo ŝirrompinte la lig-ŝnuron,  
tutforte paŝas sin en la aeron!*

*Tamen la ŝnur' deŝiris unu kruron;  
gutadas sango,  
kvazaŭ rompiĝus ĝia koro!*

*Por reakiri la liberon,  
eĉ nur por eta horo,*

*ĝi ja volonte farus vivoferon;*

*ĝi ĉirkaŭflugas,  
je O-literoj. . .*

*verŝante sian riĉan amon al la tero!*

*Ho! . . .*

*Akceptas ĝiajn plumojn, sangon,*

*karnon montoj kaj riveroj;*

*ĝian animon ĉirkaŭbrakas la ĉielo!*

**DENG ŜJAŬPING DIRIS:  
ĈINIO PLEJ DEZIRAS PACON**

En aprilo ĉi-jare, en sia intervidiĝo en Pekino kun belga ĉefministro Wilfried Martens, ĉina gvidanto Deng Ŝjaŭping diris: Kvankam ankoraŭ ekzistas danĝero de milito, tamen kreskas la fortoj bremsantaj militon. Eŭropo estas forto bremsanta militon, ankaŭ Ĉinio estas tia forto. La mond-paco estas tenebla.

Li diris, ke Ĉinio estas malriĉa, kaj sekve ne estas gravega forto. Sed Ĉinio plej deziras pacon. Sen paco Ĉinio ne realigos sian modernigon. Li diris ankaŭ, ke Ĉinio dependas de neniu bloko. Tiu sendependa ekstera politiko plej utilas al la paco. Li emfazis, ke la malferma politiko de Ĉinio celas gajni amikojn kaj akceli sian propran disvolviĝon. Tio servas ne nur al la propraj interesoj de Ĉinio, sed ankaŭ al la longdaŭra mond-paco.

*Deng Ŝjaŭping (meze) kaj Deng Jingĉaŭ (dekstre) gratulas I. Epstein.*



*Deng Ŝjaŭping intervidiĝas kun belga ĉefministro Wilfried Martens.*

**ĈINAJ GVIDANTOJ GRATULAS  
LA 70-JARIĜON DE I. EPSTEIN**

La 20-an de aprilo, por celebri la 70-an jubileon de la naskiĝo de I. Epstein, veterana ĵurnalisto,

laborinta en Ĉinio duon-jarcenton, ĉinaj koncernaj departementoj okazigis solenan kunsidon en la Popola Halo.

La ĉinaj gvidantoj Deng Ŝjaŭping, Deng Jingĉaŭ k.a. ĉeestis la kunsidon kaj esprimis sian gratulon al I. Epstein.

I. Epstein naskiĝis en Pollando. Dujara, li transloĝiĝis de Pollando al Tjanĝin kune kun siaj gepatroj. 15-jara, li jam ĵurnalistiĝis. En 1957 li akiris ŝtataneccon de Ĉinio. En la pasintaj pli ol 50 jaroj li per siaj plumoj verkis amason da raportajoj pri propraokule viditaj faktoj en Ĉinio por prezenti al la mondo la aktualaĵojn de la ĉina revolucio.

En 1951, invitive de Song Ĉingling (1893-1981, edzino de Sun Jatsen), li partoprenis en la prepara laboro por funkciigi la revuon "Ĉinio en Konstruado". Ekde 1979 li fariĝis ĝia ĉefredaktoro.

## ĈINA NUTRAJ-INDUSTRIO EN RAPIDA DISVOLVIĜO

En la lastaj jaroj la ĉina nutraj-industrio rapide disvolviĝis por kontentigi la bezonon de brutobredado kaj akvanimala bredado.

Laŭ nekompleta statistiko, la departementoj de grenoj, brutobredado, agrikulturo kaj akvoproduktaĵoj funkciigas 93 tiajn fabrikojn ĉiu kun jara produktokvanto de pli ol 10 000 tunoj kaj pli ol 2 500 tiajn fabrikojn ĉiu kun jara produktokvanto de 2 000 tunoj. Krome, ankoraŭ troviĝas multaj tiuspecaj malgrandaj fabrikoj en la kamparoj. - En la lasta jaro Ĉinio produktis 12 milionojn da tunoj da kunmetita kaj miksita nutraĵo, 4 milionojn da tunoj pli multe ol tiuj en 1983.

## LA ĈINA KOMUNIKA SATELITO FUNKCIAS NORMALE

Post kiam la unua ĉina eksperimenta komunika satelito sukcese difinis sian pozicion en la 16-a de aprilo, 1984, ĉiam normale funkcias ĝi kaj ĉiuj ĝiaj sistemoj.

Dum pli ol unu jaro milita, telelevizia, radioelsenda, hidroelektra kaj ĵurnalisma departementoj de Ĉinio uzis la sateliton por funkciigi ciferan kaj analogan telefonion, telelevizian, radian, bildan

kaj skribajan, donitajan kaj tabelan elsendon kaj ricevis bonan efikon.

## EVIDENTA PROGRESO DE VISCERO-GREFTA SCIENCO

Viscera grefto, kiel nova medicina scienco, akiris evidentan progreson en Ĉinio. La ĝisdataj informoj montras, ke kuracistoj de 25 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio sukcese faris greftan operacion de reno, hepato, koro, pulmo, lieno kaj aliaj organoj al 1 500 pacientoj. Inter ili la greftoj de pankreataj insuletoj, paratiroidoj, surrenaj glandoj, timuso kaj testiko ĉiu atingis internacie avangardan nivelon.

En la fino de la 60-aj jaroj Ĉinio unuafoje greftis renon por paciento kaj en la lasta periodo de la 70-aj jaroj sukcese faris heptan grefton. En la lastaj jaroj Ĉinio faris greftan operacion de koro, pulmo, lieno kaj endokrinaj visceroj.

## ĈINAJ JUNULAJ KAJ KNABAJ VIOLONISTOJ PREMIITAJ

La ĉinaj violonistoj, 15-jara Ŭang Ŝjaŭdong kaj 14-jara Ĝuo Ĉang gajnis respektive la unuajn premiojn de la junula kaj knaba grupoj en la Dua Internacia Menuhina Junula kaj Knaba Vio-

lona Konkurso okazinta aprile en Britio. Alia ĉina violonisto Ĉaj Ljang gajnis la trian premion de la junula grupo.

Ŭang Ŝjaŭdong gajnis la unuan premion de la geknaba grupo en la Unua Internacia Menuhina Junula kaj Knaba Violona Konkurso okazinta en 1983. Ĉi-foje li ludis G minoran duan violonan konĉerton de S. Prokofief. Prezidanto Jehudi Menuhin de la konkurso direktis la orkestron, la Britan Reĝan Orkestron.

43 violonistoj el Ĉinio, Usono, Aŭstrio, Britio, Danlando, Rumanio, Pollando, Francio kaj aliaj ok landoj partoprenis en la konkurso.

## ĈINOJ GAJNIS 6 ORAJN MEDALOJN EN LA KVARA MONDPOKALA PLONĜA KONKURSO

De la 25-a ĝis la 28-a de aprilo, la nomita konkurso okazis en Ŝanhajo. La ĉinaj sportistoj gajnis tri teamajn ĉampioneojn: viran, virinan kaj geviran kaj tri individuajn ĉampioneojn: Tong Huj gajnis ĉampionecon de vira turplonĝo, Tan Ljangde kaj Li Jihŭa la ĉampioneojn de vira kaj virina trampliloplona respektive. Usona sportistino Michelle Mitchell gajnis ĉampionecon de virina turplonĝo.


*Tong Huj gajnis la ĉampionecon de vira turoplonĝo.*



*Li Jihŭa gajnis la ĉampionecon de virina trampliloplona.*



*Tang Ljangde gajnis la oran medalon de vira trampliloplona.*



## CINOJ GAJNIS TRI ORAJN MEDALOJN EN SPORTA AKROBATADO

La Ĉina Sporto-akrobata Teamo gajnis 3 orajn medalojn kaj unu arĝentan medalon en la Sovetia Vilnius-a Internacia Sporto-akrobata Turniro, kiu finiĝis la 17-an de aprilo: Ŭang Pej, Ĝaŭ Ĝje, Ŭang Lijoŭ kaj Ĝoŭ Ĉuanbjaŭ gajnis la viran kvaropan ĉampionecon. Ĝoŭ Ŝing kaj Ju Ĝjanŝjang viran parludan ĉampionecon, Kang Ĝjunŝiŭ kaj Du Ŝjaŭ la virinan parludan ĉampionecon. Ĝjang Gŭangming kaj Ju Ĝjanĝjun gajnis la duan lokon en la gevira parludo.

## ALILANDAJ ARTISTOJ EN PEKINO

Vigla estis la scenejo de Pekino en aprilo. Aŭstraliaj kaj Eŭropaj artistoj ludis por la pekinanoj.

La Sidneja Danco-trupo de Aŭstralio estas fama moderna balettrupo. Ĝiaj programeroj estas vivecaj kaj viglaj, danc-movoj lertaj kun tradiciaj stiloj de



La Dana Reĝa Baleta Trupo prezentas "Feinoj" en Pekino.



La Sidneja Danco-trupo de Aŭstralio prezentas "Hejmlando" en Pekino.


aŭstraliaj dancoj kaj teatraĵoj. La trupo ludis en Pekino "Hejmlando", "Dezerto" kaj "Nigro kaj Blu".

La Brita Elektrona Orkestro Wham estas fama pro popularaj kantoj kun juneco, vikleco kaj moderna ritmo. Ĝi rikoltis vastan laŭdon de aŭskultantoj en Pekino.

La mondnivela Dana Reĝa Baleta Trupo portis al pekinanoj grandan ĝuon. Ĝi prezentis "Feinoj" kaj la trian akton de "Napoli".

Norvega violonisto Terje Tonnesen prezentis al pekinaj aŭskultantoj verkojn de Mozarto kaj C. Debussy.

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Sanhajo
3. Uŝji
4. Kajfeng
5. Jiĝjun
6. Tibeto
7. Ŝjian
8. Uhan
9. Ŝinŝjang
10. Interna Mongolio
11. Suĝoŭ
12. Hami
13. Bojang
14. Sihezi

# AGRIKULTURO DE LA ALTEBENAĴO

de ĈJUN SANG

Estis meze de julio. Ora sezono venis al la Tibeta Altebenaĵo. En la riveraj regionoj Lhasa, Ŝannan kaj Ŝigaze, en la meza kaj malsupra basenoj de la rivero Jarlung Zangbo kaj en la gubernioj de la sudorienta Tibeto Zaju kaj Medong, ĉie prospere kreskis plantaĵoj. Jen gren-tenejo de Tibeto, ĉefaj agrikulturaj regionoj de Tibeto.

Agrikulturo okupas gravan lokon en la ekonomio de Tibeto, kie krom paŝtistoj plejparto de la loĝantaro okupas sin pri agrikulturo. La nunaj tibetaj kamparanoj jam adiaŭis lignajn plugilojn kaj gruntbovojn por plugado kaj draŝado kaj similajn primitivajn produktajn metodojn kaj ekuzis novajn agrikulturilojn meĥanikajn kaj duon-meĥanikajn. En

1984, malgraŭ la natura katastrofo plaginta la ĉefajn grenajn produktojn de Tibeto, la loko rikoltis sume 480 000 tunojn da greno, kio estis malfacile imagebla por la malnova Tibeto. En la malnova Tibeto la kruela servuta sistemo sufokis la produktan aktivecon de la tibetanoj, ke la tibeta agrikulturo longtempe restis en ekstrema postgiginteco kaj la hek-

*Lŭoba-aj knabinoj en tibeta kamparo*

Foto de TUDENG





tara produktokvanto estis nur ĉ. 750 kg. Tia stato daŭris ĝis la unuaj 50-aj jaroj de la nuna jarcento.

## NOVA PERIODO DE LA AGRIKULTURO

Tibeto estis pace liberigita en 1951. Por ŝanĝi la postĝintecon de ĝia agrikulturo la ĉina centra registaro kiel eble plej efike subtenis ĝin homforte, materiale kaj finance. En 1959, kiam Tibeto abolis la servutan sistemon kaj faris demokratian reformon, ĝiaj kamparanoj unuafoje havis siajn proprajn parcelojn kaj produktajn rimedojn. Tiu historia ŝanĝiĝo estigis la produktan aktivecon ĉe la kamparanoj. Helpate de la registaro kaj han-naciaj agronomoj, la tibetaj kamparanoj komencis fundamentan konstruadon de la kampoj. La partigitaj parceloj kunligiĝis en vastajn kampojn taŭgajn por maŝina terkulturado. En multaj lokoj facile atakataj de inundo kaj trosekeco aperis akvokonservejoj, laĝetoj kaj kanaletoj drenaj kaj irigaciaj. En 1979 la irigaciataj kampoj de Tibeto atingis 151 mil hektarojn, konsistigante 66% de la totala agraro de Tibeto. Fine ŝanĝiĝis la miljara agrokultura produktado decidata de naturaj kondiĉoj.

La sukcesoj en la fundamenta konstruado de la kampoj pretigis necesajn kondiĉojn por fini la primitivajn produktajn manierojn kaj uzi maŝinojn en terkulturado de Tibeto. En la komenco de la 70-aj jaroj granda nombro da traktoroj, dizeloj, semiloj, kombajnoj, draŝiloj kaj ventummaŝinoj transportiĝis de internaj partoj de Ĉinio al Tibeto. Dank' al tio la tibeta agrikulturo suriris novan vojon uzi maŝinojn en plugado, semado, draŝado, ventumado kaj transportado. Nun la aŭtonoma regiono havas pli ol 10 000 diversaspecajn grandajn



La riĉiĝinta Lūsang Ŭangduj

Foto de ĈENG ŜJI

kaj malgrandajn traktorojn, per kiuj oni povas plugi 25% de la agraro de Tibeto. Dank' al uzado de maŝinoj la rapido en plugado, semado, draŝado ktp. altiĝis 3-4-oble.

## SCIENCA TERKULTURADO

Aplikado de la novaj laboriloj kaj tekniko akcelis ne nur disvolviĝon de la agrikultura produktado, sed ankaŭ naskiĝon de la tibeta agronomio. Frue en la komenco de la 60-aj jaroj iuj han-naciaj scienco-esploristoj venintaj de la landinterno komencis studi la agrikulturan produktadon de Tibeto. En la 70-aj jaroj tiu sciencista trupo grandiĝis. En la pasintaj 20 jaroj, la hanaj kaj tibetaj agronomoj elkulturis novajn speciojn de hordeo, tritiko, kolzo kaj aliaj grenoj. Nun tiuj bonaj specioj estas tre ŝatataj de la tibetaj kamparanoj. Kamparano Bajma Danzeng semis bonspecian hordeon "Himalajo n-ro 6" en siaj 1.7-hektaroj da kampoj kaj rikoltis 7 300 kg. da greno, kaj

lia hektara produktokvanto superis je 50% tiun de lia hejmloko. Nun li, profitanta de la moderna agronomio, planas turni siajn kampojn en bonspecian bazon por liveri bonspeciajn semojn al siaj samvilaĝanoj.

Gjaze-gubernio ĉe la rivero Njangĉu akiris rimarkindajn sukcesojn en scienca terkulturado. Tie la kampoj troviĝas sur loko ĉ. 4 100 metrojn alta, la senprujna periodo daŭras nur ĉ. 110 tagojn kaj la jara precipitaĵo estas 250-300 mm. En 1970 la grena produktokvanto de la gubernio estis malpli ol 10 000 tunoj. Poste la gubernia registaro, gvidante la kamparanojn, plenenergie disvastigis sciencon terkulturan kun fundamenta konstruado de la kampoj. Sekve de tio aperis multaj porbonspeciaj kaj eksperimentaj kampoj. Por disvastigi inter la kamparanoj sciencajn kaj teknikajn sciojn, la gubernio fondis diversnivelajn agrikulturajn sciencesplorajn organizaĵojn. Post kiam la ĉina kam-

paro alprenis la sistemon de laŭkontrakta produktado, la scienco-esplora organizaĵo de Gjaze-gubernio sendis teknikistojn al la vilaĝoj, por ke ili faru kontraktojn kun la kamparanoj pri teknika servo. Lastajare la agronomiaj teknikistoj de la gubernio faris kontraktojn kun terkulturistoj pri 4 600 hektaroj da kampoj. La nova metodo estas laŭdata de la kamparanoj kaj teknikistoj. Dank' al la nova metodo aperis en la gubernio senprecedence ĝojiga situacio. De 1980 la agrikultura produktado de Tibeto suferis naturan katastrofon en sinsekvaj 3 jaroj, tamen la gubernio havis stabilan abundan rikolton en la jaroj. Ĝia jara produktokvanto ĉiam superis 27 500 tunojn kaj en 1985 superis 35 000 tunojn.

## DIVERSAJ ENTREPRENADOJ

Ekde 1980 la popola registaro de la Tibeta Aŭtonoma Regiono

praktikas en la agrikultura regiono novan principon "ĉefe disvolvi agrikulturon, kombinante agrikulturon kun brutobredado, disvolvi diversajn entreprenadojn kaj varproduktadon." Dank' al tio rapide disvolviĝis la tieaj brutobredo, kromproduktado, transportado, komerco, konstruado, servado kaj turismo. La kamparanoj komencis turni sin el la longtempa natura ekonomio kaj proviza ekonomio kaj suriris la vojon de komerca ekonomio.

Nun en Tibeto troviĝas pli ol 46 000 specialigitaj familioj, 600 ekonomiaj unuoj kooperaj. Laŭ la enhavo kaj kondiĉoj de produktado la kamparanoj memvole organizis sin kaj kune entreprenas por pli da ekonomiaj profitoj. Lŭosang Ŭanduj, kamparano de Gjabe, havas nun 3 traktorojn. Li okupas sin pri terkulturado kaj longdistanca transportado, tial li fariĝis riĉulo fama tra la tuta Ti-


бето. Riĉiĝinte, li tamen ne forĝesis la neriĉajn samvilaĝanojn, kaj ofte helpas ilin en produktado. En laborplena sezono li plugas, semas kaj rikoltas per siaj traktoroj por pli ol 100 familioj, malmulte pagigante nur pro la konsumita dizeloleo. En la cetera tempo li organizis pli ol 500 kamparanojn en konstruistatan taĉmenton por domkonstruado. En la lasta jaro, la taĉmento gajnis pli ol 250 000 jŭanojn, ĉiu enspezis 500 jŭanojn. Li investis 30 000 jŭanojn por starigi en sia gubernio vendejon de agrikulturaj produktaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj, entreprenatan de li kaj aliaj 12 kamparanoj. Tio ne nur oportunigis la lokanojn en la vivo, sed ankaŭ plienspezigis la 12 partoprenantojn.

De la 60-aj jaroj ĝis hodiaŭ la agrikulturo de Tibeto multe disvolviĝis, tamen ĝia granda latento atendas ekspluaton. Enketado de ĉinaj agronomoj en 1984 montris, ke la agrikulturaj plantoj kreskantaj en Tibeto havas pli fortan adaptiĝemon ol la aliaj konitaj agrikulturaj plantoj de la mondo. Ekz. hordeo povas normale kreski eĉ en regiono 4 730 metrojn alta. La agronomoj trovis ankaŭ pli ol 10 variojn de tritiko, el kiuj 6 estas neniam menciitaj internacie. Krome, la subloĝata Tibeto havas vastan virgan teron. Estonte, se la virga tero estos ekspluatita kaj science utiligata, la agrikulturo de Tibeto havos brillan perspektivon.

En draŝejo

Foto de LIŬ TJEŜENG





*Kamparo de suda Tibeto en printempo*

Foto de **ĈEN ZONGLJE**



*Semo-selektado per maŝino*


Foto de **TUDENG**



*Rikoltado* Foto de JAN ĜIN

*Traktoristinoj de la tibeta nacieco*

Foto de CAJ LONG






*Legomo kulturata sub plasta membrano*

Foto de **LIŪ TJĚŠENG**

*Baldaŭ venos riĉa rikolto.*

Foto de **ĈENG MINGGUJ**






*La loĝloko de ĉinaj kaj usonaj prospektoroj*

## ESPLORO PRI GRANDA DEZERTO

Fotoj de ĈJU ŬEJBO

*Teknikistoj en domo surkampe kalkulas sismologiajn donitaĵojn per mikrotraktilo.*



*Prospektoroj esploras graviton.*



*Kunlabore kun la Geofizika Servokompanio de Usono, la Fizik-esplora Buroo de la Ĉina Petrol-industria Ministerio en junio de 1983 komencis ĝeneralan petrol-prospektoradon en Taklimakan-dezerto de nordokcidenta Ĉinio kaj akiris multajn novajn materialojn pri la regiona strukturo kaj geologia tavolo de la dezerto.*

*Taklimakan-dezerto en la mezo de Tarim-baseno en suda Ŝinĝiang kovras areon de pli ol 337 000 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej*

*granda en Ĉinio. Ĝiaj sablomontetoj moviĝas laŭ vento kaj formas originalan geomorfologion. Neniu antikva aventuristo preterlasis okazon vojaĝi tra tiu dezerto. En la 19-a jarcento fama sveda esploristo Sven Anders Hedin rajdis sur kamelo laŭ rando de Taklimakan kaj asertis, ke la loko ne taŭgas por vivo, ĝi estas maro de morto. Sed nun en la dezerto loĝas petrol-prospektoroj. Dank' al ilia laboro oni vidos belan perspektivon de la dezerto.*


### *La vastega dezerto*





*En laboro*

*Bormašino faras truon por sismologia esplorado.*



*Manipulado de aparato por difini pozicion de arta satelito*





# ALTE TENU LA STANDARDON DE PACO KAJ DISVOLVO

Jen venis la 30-a datreveno de la Bandung-a Kunveno. Invitite de la registaro de Indonezio reprezentantoj de aziaj kaj afrikaj landoj kunsidis la 24-an kaj 25-an de aprilo en Bandung por diskuti pri la gravaj aferoj de la nuna mondo. Tio estas alia solena kunveno de la Tria Mondo gvidata de la principo de la Bandung-a Kunveno.

En 1955 en Azio kaj Afriko estis nur 30 suverenaj ŝtatoj. En la pasintaj 30 jaroj sendependiĝis aliaj 60 landoj en Azio kaj Afriko. Tiu giganta historia ŝanĝiĝo elokvente pruvis la profundan influon kaj fortan vivipovon de la Bandung-a spirito. La spirito iniciatita de la Bandung-a Kunveno oponi kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, protekti nacian sendependecon, oponi kontraŭ agresa milito kaj disvolvi amikecon kaj kunlaboron inter la popoloj de ĉiuj landoj, ankoraŭ havas gravan aktualan signifon por gvidi la internaciajn rilatojn, solvi la internaciajn konfliktojn kaj defendi la mondpacon.

De kiam naskiĝis la spirito de la Bandung-a Kunveno, giganta ŝanĝiĝo okazis en la mondo. Plejparto de la Aziaj kaj Afrikaj landoj jam fundamente mastris sian sorton, trapasis la unuan historian etapon realigi la politikan sendependecon kaj nun eniris en la duan historian etapon potencigi la landon kaj riĉigi la popolon. En la monda sfero la landoj de la Tria Mondo harmoniigis sian agadon, unuanime kunlaboras kaj fariĝis neignoreblaj fortoj en la internacia vivo kaj en certa grado rompis la arbitran volon kaj arogantan manipulon de la superpotencoj super la mondaj aferoj. La nova situacio inokulis vivan forton al la spirito de la Bandung-a Kunveno kaj donis novajn taskojn al la Azi-afrikaj landoj. Hodiaŭ sub la standardo de paco kaj disvolvo la popoloj de la azi-afrikaj landoj kaj la tuta Tria Mondo ŝarĝis sin per pli grava historia misio, t.e. defendi la nacian sendependecon, akceli la ekonomian kunlaboron kaj amikecon kaj defendi la mondpacon.

*U Ŝjueĉjan (dekstre),  
membro de la Ŝtata  
Konsilantaro kaj  
ministro de eksteraj  
aferoj de Ĉinio, en  
soleno por celebri la  
30-an datrevenon de  
la Bandung-a  
Kunveno*





*La 30-a datrevenon de la Bandunga Kunveno celebrata en Pekino*

Nun nia mondo frontas al du strategiaj problemoj: paco kaj disvolvo. Por defendi la mondpacon, oni devas batali kontraŭ hegemoniismo. La superpotencoj faras intensajn militajn konkursojn kaj armitan kontraŭstaron por hegemonio super la mondo, kio faras la internaciajn cirkonstancojn ege malkvietaj. Aliflanke, la monda popolo vekigis tagon post tago, rapide kreskas la kontraŭmilitaj fortoj, kaj la leviĝo de la Tria Mondo fariĝis ŝlosilo por kresko de la pacaj fortoj de la tuta mondo. Se nur la popoloj de Azio kaj Afriko unuiĝos, fortigos sian batalon por la mondopaco, do milito povos esti prokrastita por necerta tempo kaj eĉ evitita finfine. Konsekvence la mondo povos pasigi dekojn da jaroj en paco kaj trankvilo.

Rilate la problemon pri disvolvo, oni devas rompi la malegalrajtan ekonomian interrilaton inter la disvolviĝantaj sudaj landoj kaj disvolvigitaj nordaj landoj kaj starigi novan ordon por la internacia ekonomio. En la pasintaj 30 jaroj kun sia politika emancipiĝo la nove leviĝantaj ŝtatoj de Azio, Afriko kaj aliaj partoj de la mondo gratulinde progresis en sia ekonomio. Tamen, por daŭrigi sian ekspluatadon al la disvolviĝantaj landoj, multaj disvolvigitaj landoj ankoraŭ rigardas tiujn pasintajn koloniojn neforlaseblaj merkatoj, kapital-investejoj kaj material-produktejoj, kun la intenco firme konservi la malnovajn tradiciojn de la internacia ekonomio. Dume iuj disvolviĝantaj landoj ankoraŭ ne observas la principon "konstrui la landon per siaj propraj fortoj", ne trovas sperton konvenan al sia propra konstruado, por reformi la antaŭajn malfortajn ekonomiajn bazojn kaj elturniĝi el la ekspluatata pozicio. Ĝuste pro tio la internaciaj merkatoj, prezoj kaj kapitalo



estas daŭre regataj de la disvolvigitaj landoj. Nemalmultaj disvolviĝantaj landoj implikiĝas en stagnado de produktado, superstokiĝo de varoj, ekonomia maligniĝo, financa deficitado, malfavora bilanco, oftaj naturaj katastrofoj kaj ekstrema mizero de la popoloj. La stato pli kaj pli larĝigis la diferencon inter la malriĉa Sudo kaj riĉa Nordo kaj akiris iliajn kontraŭstarojn.

Sub la novaj cirkonstancoj la disvolviĝantaj landoj konsciis, ke ili nepre devas plifortigi la kunlaboron inter la sudaj landoj, akceli intertraktadon inter la Sudo kaj Nordo, starigi novan internacian ekonomian ordon, defendi la mondpacon, kio ja garantias ilian propran disvolviĝon. Ili scias, ke la ekonomia disvolviĝo helpas protekti la pacon kaj la efektiviĝo de paco akcelas disvolviĝon de ekonomio. Ili estas nedisigeblaj stimuletoj unu la alian, kaj la kerno de la problemo estas ilia ekonomia disvolviĝo de la disvolviĝantaj landoj. Tial alte teni la standardon de paco kaj disvolvo estas ŝlosilo por la landoj de la Tria Mondo por disvolvi la spiriton de la Bandung-a Kunveno.

Ĉinio, kiel unu el la disvolviĝantaj landoj, apartenas al la Tria Mondo. Ĝi estas grava faktoro por mondopaco, sekureco kaj stabileco. La paca diplomacia principo de Ĉinio komplete kongruas kun la principo de la Bandung-a Kunveno. Hodiaŭ, kiam oni celebras ĝian 30-an datrevenon, la ĉina popolo decidis disvolvi ĝian spiriton kune kun la popolo de Azio, Afriko kaj aliaj mondpartoj, plenenergie antaŭenpuŝi la socialisman modernigon de sia propra lando, potencigi la fortojn malhelpantajn militon kaj fari pli da kontribuoj al la paco kaj evoluo de la homaro.

## **Cerbosaniga ekzercado**

de **ĜAŬ ĜENGPING**



La praktiko de la sporta medicino montras, ke cerbosaniga ekzercado povas dilati la kapilarojn de la cerbo, kreskigi la cirkulan kvanton de ĝia sango, provizi la cerbon per sufiĉaj nutraĵoj kaj oksigeno kaj plibonigi la funkcion de la centra nerva sistemo. Faru la cerbosanigan ekzercadon kiel jene:

1. Platigu la manojn kun mankavoj internen, premu la dekstran kaj maldekstran tempiojn respektive per la dikfingroj kaj la akupunkturajn punktojn *Jintang* per la ceteraj, masaĝu ilin dek-

foje kaj daŭre masaĝu ilin po dekfojoj per ambaŭ manoj. Faru tion kun meza rapideco. (Por unu kaj duona minutoj)



2. Masaĝu kaj milde knedu dekfoje ire-reire kaj pli kaj pli forte samtempe per la dikfingroj la lokon de la akupunkturaj punktoj *Tjanĝu* flanke de la nuka kavoj ĝis la akupunkturaj punktoj *Fengĉi* ĉe la kaphara rando. Acida kaj ŝvela sento ĉe tio produktas bonan efikon. (Por du minutoj)

3. Premu kelkfoje per la mankavoj la kapsurfacon ĉe la oreloj, masaĝu per la longaj

fingroj la orelojn kaj supren ĝis la akupunkturaj punktoj *Bajhuj* sur la verto-centro. (Por unu kaj duona minutoj)

4. Mallevu la brakojn, movu la kapon antaŭen-malantaŭen, poste dekstren-maldekstren, kaj turnu la kapon de maldekstre dekstren kaj poste inverse. (por kvin minutoj)

Estu gajhumora ĉiutage, sen ĉagreno, melankolio kaj maltrankvilo. Nur tiel vi povas atingi bonan efikon en la cerbosaniga ekzercado.



Premu la dekstran kaj maldekstran tempiojn per la dikfingroj kaj la akupunkturajn punktojn *Jintang* per la ceteraj (Bildo 1).

Masaĝu kaj knedu la lokon de la akupunkturaj punktoj *Fengĉi* ĉe la kaphara rando (Bildo 2).

Premu kelkfoje la kapsurfacon ĉe la oreloj kaj masaĝu per la longaj fingroj la orelojn (Bildo 3).

Mallevu la brakojn kaj movu la kapon antaŭen-malantaŭen, poste dekstren-maldekstren (Bildo 4).



*La kultivejo de la familio de Li Gūoŝin en Ŝihezi, Ŝingĵang*

*(Daŭrigo de p. 6)*

tivejo 3.5 hektarojn da rizkampoj, kaj enspezis 6 369 jŭan-ojn. Tiujare, Tjan aĉetis malnovan traktoron per 1 500 jŭan-oj, kies du kvinonoj estis pruntitaj de la ŝtata kultivejo. En 1983, li fondis familian kultivejon farmante de la ŝtata kultivejo ĉ. 7 hektarojn da rizkampoj. Kvankam la rikolto estis nebona pro inundo, tamen la enspezo ankoraŭ superis 10 000 jŭan-ojn dank' al la enspezo pro transportado, bredado de anasoj, abeloj kaj porkoj, tajlorado kaj aliaj laboroj. Tiujare, li aĉetis mantraktoron, plugboton, draŝmaŝinon, kamionon kaj pumpilon. En 1984, li farmis 13 hektarojn da kampoj, kaj la totala enspezo en la jaro superis 29 000 jŭan-ojn, nome 39-oble pli multe ol en 1977 antaŭ la praktikado de laŭkontrakta produkta sistemo. La familio de Tjan fariĝis unu el la plej frue riĉiĝintaj

familioj de Ĝjangŝji-provinco kaj gajnis la honoran titolon de labormodelo de provinca nivelo.

Pruvite, ke la familiaj kultivejoj pli kompakte unuigis la laboristojn kun la produktaj rimedoj, produktaĵoj kaj dividado, plene stimulis la aktivecon de la laboristoj kaj iliaj familianoj en produktado, altigis adaptiĝemon al la cirkonstancoj, akcelis produktadon kaj akiris plej bonan ekonomian efikon.

La fondiĝo de familiaj kultivejoj multe vigligis ekspluaton de virga tero. Sufiĉe pripensinte, Jang Gŭanĝu, 33-jara laboristo de la Unua Filio de Ŝihezi-kultivejo de Ŝingĵang, decidis en februaro de 1984 fondi familian sintezan kultivejon de agrikulturo, forstokulturo, bruto-bredado kaj kromokupo sur 17 hektaroj da dezerta tero. Li kontraktis kun la Unua Filio, ke la kontrakto validos 15 jarojn kaj li rajtos kulturi maksimume 33 hektarojn da tero, ke la filio ne difinos al li konkretan kvoton, ke li mem aranĝu ĉiujn laborojn kaj mem prirespondu pri la spezado, ke lia kultivejo devas pagi la salajrojn kaj aliajn elspezojn de la 4 laboristoj, kiuj laboros en la kultivejo.

Jang Gŭanĝu pensis, ke kreskigi plantaĵojn sur dezerta tero estas antaŭkondiĉita de plibonigo de irigaciado. Do, per sia mono kaj la pruntedono de la filio, li fosis puton sur la kampo, instalas alttensiajn lineojn kaj akvo-pumpilon, kaj akiris sufiĉan akvon por irigacio. Li plantis tritikon, kolzon, beton, maizon, diversajn melonojn ktp. Krome li plantis du kontraŭventajn forstozonojn kaj kreis malgrandan fruktoĝardenon. Lian penan klopodon rekompencis bonaj fruktoj. La totala enspezo de la somera kaj

aŭtuna produktaĵoj kaj la kromproduktaĵoj superis 30 000 jŭan-ojn, kaj efektive li enspezis pli ol 4 500 jŭan-ojn, post pago de produktokosto, salajro de la laboristoj kaj imposto.

Antaŭe, la produkta strukturo de la ŝtataj kultivejoj estis unuforma, plejparto de la laboristoj devis ofte labori en la limigita kampo super limigita produktado de greno aŭ la ekonomia planto, la produktiveco kaj la produktovaloro estis malaltaj kaj la komerca ekonomio mizera, la ekonomia enspezo de la kultivejoj venis ĉefe de produktado de grenoj kaj iu ekonomia planto. La kapitalo estis malmulta kaj la ekonomia forto malgranda. Post la fondiĝo de la familiaj kultivejoj, sekve de altiĝo de produktiveco kaj ekonomia efiko, iuj produktis ĉefe grenojn kaj aliajn produktaĵojn, iuj forlasis la produkton de grenoj kaj fondis familian forstokultivejon, paŝtejon, fiŝbredejon kaj prilaborejon de agrikulturaj kaj brutbredaj produktaĵoj. La administra formo de ŝtataj kultivejoj ŝanĝiĝas, la proporcio de la produktovaloroj de la forstokulturo, bruto-bredado, fiŝbredado kaj kromokupoj rapide altiĝis en la totala produktovaloro de la industrio kaj agrikulturo de la ŝtataj kultivejoj. La superflua laborfortoj de la agrikultura laboro eĉ forlasis la terkulturon. Per siaj talentoj, ili mem kolektis monon, aĉetis maŝinojn, lernis teknikojn, funkciigis diversajn familiajn fabriketojn kaj metiejojn, klopode disvolvis produktadon de varoj por kontentigi la bezonojn de la merkato. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol 2 925 familiaj fabriketoj kaj metiejoj fondiĝis en nur 5 kultivejoj Ŝingĵang, Hejlongĝĵang, Gŭangdong, Fuĝĵan kaj Interna Mongolio. Krome, iuj superflua laborfortoj oku-

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* 35-jara infana pedagogino deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, interŝanĝante bildkartojn. Sonja Senj, p.k.16, BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.
- \* 27-jara elektronikfaklaboristo, dez. kor. tutmonde, kol. bk., esperantaĵojn. Bernd Mann, GDR-7024 Leipzig, Baunackstr. 3.
- \* 36-jara scienca agronomo deziras interŝanĝi maksimum-kartojn kaj bildkartojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid Senj, Poŝtenska kutija 16 BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.
- \* Mi volas korespondi pri diversaj temoj esperante, rumane kaj hungare: 16-j. knabo Eross Lajos, Frumoasa 11, R-4135, Harghita, Rumanio.
- \* 19-jara Nagy Terezo, Belso 1233, Joseno Harghita 4206, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri muziko,

sporto kaj literaturo, esperante kaj hungare.

- \* 53-jara sperta esperantisto kun pluraj interesoj deziras korespondi pri diversaj temoj, ankaŭ pri ĉiutaga vivo. Jerzy Dembicki, Daszynskiego 1/34, 33-300 Nowy Sacz, Pollando.
- \* 31j. instruisto dez. kor. tutmonde, int. pri vojaĝo kaj infanlibroj kaj kol. insignojn. Tiu, kiu sendas al mi insignojn, ricevos egalan nombron germanan insignojn. Christian Papenmeiev, GDR-9156 Delsnitz Db. Hauptstr. 104.
- \* (36-jara) lingvoinstruisto verkas libron kun amuzaj ekzercoj en lingvoinstruado. Li ŝatus interalie uzi ankaŭ la rusan, hispanan, italan kaj francan kaj pro tio serĉas bonvolajn helpantojn, kiuj scias tiujn lingvojn. Skribu al Dierk Andresen, Stuttgarter Str.86, D-7063 Welzheim, FR Germanio.
- \* 37-jaraĝa telegrafia inĝeniero deziras korespondi kun geesperantistoj (speciale telekomunikaj gelaboristoj) de ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. S-ro Arai Hiroshi, Ooaza-kami 1366-1, Ageo-shi, Saitama-ken 362, Japanio.
- \* Hans Fehler, Alfelder Str. 9, D-3200 Hildesheim, FR Germanio, 55j. Docento/pedagogo por handikapuloj, deziras korespondi kun ĉina koleg(in)o.
- \* 42-jara s-anino Jldiko Kovessi, Debrecen, Micsurin u 140 II.e 6, 4031, Hungario, deziras korespondi kun iu el Ĉinio.

- \* Loczko Erzsebet, Str. Ebhat Wr. 1678, Loc. Remetea, Harghita 4212, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj.
- \* F-ino Maria Abramova (20-jara studentino de pedagogio), str. Hondamir, SU-700132, Taŝkento, Uzbekio, USSR, dez. kor. pri Esp. movado, popolaj kutimoj kaj moroj kaj pri kuirarto.
- \* F-ino Ulkina Larisa (18-jara), str. Sarikulskaja 8-1, SU-700167, Taŝkento, Uzbekio, USSR, dez. kor. tutmonde pri literaturo, psikologio, arto kaj Esp.movado.
- \* Nina kaj Alekseo Aleksandrov (geedzoj), Poĉtamt, ab/k 240, SU-700000, Taŝkento, Uzbekio, USSR, dez. kor. pri popolaj kutimoj, beletro, naturo, arto, komputado, Esp.movado kaj interŝanĝi bk, kalendaretojn, esperantaĵojn tutmonde.
- \* Ni estas lernantoj de elementa lernejo el Jugoslavio kaj ni deziras korespondi tutmonde kun samklasanoj (sesa k. sepa klasoj), aparte kun tiuj el Ĉeĥoslovakio. Bonv. skribi al:
  - Mateja Popid, Cesta na Boc 24,63250 Rogaska Slatina;
  - Karli Lipnik, Irje 46 A,63250 Rogaska Slatina;
  - Golez Bostjan, Osnovna sola Ratanska vas, 63250, Rogaska-Slatina;
  - Boris Vuzen, Presernova 35, 63250 Rogaska Slatina;
  - Kristijan Bracun, Presernova 34, 63250 Rogaska Slatina;
  - Sandi Cujez, Celjska cesta 49, 63250 Rogaska Slatina.

piĝis pri komerco, manĝaĵ-preparado, hotela servado, transportado kaj aliaj sociaj servoj.

Post la fondiĝo de la familiaj kultivejoj, novaj demandoj staras antaŭ labormetodoj, administra strukturo kaj direktado de la produktado, liverado kaj vendado de

la ŝtataj kultivejoj. La nova administra formo de kombino de unuigo kaj disigo kaj de la kultivejoj grandaj kaj malgrandaj anstataŭis la malnovan formon de la administrado alte centralizita de la granda kultivejo. La administra strukturo de la ŝtataj kultivejoj

transiras de la malnova modelo de kultivejo — filio — produkta brigado al la nova modelo de kultivejo (aŭ kombinuma entrepreno de industrio, agrikulturo kaj komerco) — speciala kompanio aŭ servo-centro — familiaj kultivejoj.

## 第十四课 Dekkvara Leciono

### 问 候 *Wèn'hòu (Salutoj)*

#### Ofte uzataj vortoj

你 早	nǐ zǎo	bonan matenon
早上好	zǎoshàng hǎo	bonan matenon
晚上好	wǎnshàng hǎo	bonan vesperon
晚 安	wǎn'ān	bonan nokton
你去哪儿	nǐ qù nǎer	kien vi iras
我去宾馆	wǒ qù bīnguǎn	mi iras al hotelo
再 见	zàijiàn	ĝis revido

#### Konversacio

A: 你好!	A: 你身体好吗?	A: 你去哪儿?
A: Nǐhǎo!	A: Nǐ shēntǐ hǎoma?	A: Nǐ qù nǎer?
vi bon-	vi korp- bon- ĉu	vi ir- kie
A: Saluton!	A: Kiel vi fartas?	A: Kien vi iras?
B: 你好。	B: 很好。	B: 我去宾馆。
B: Nǐhǎo	B: Hěn hǎo	B: Wǒ qù bīnguǎn
vi bon-	tre bon-	mi ir- hotel-
B: Saluton!	B: Tre bone.	B: Mi iras al hotelo.
A: 欢迎你!	A: 一路上顺利吗?	A: 再见!
A: huānyíng nǐ!	A: Yìlù-shàng shùnlì ma?	A: Zàijiàn!
ĝoj- renkont- vi	unu voj- sur glat- ĉu	refoje vid-
A: Bonvenon al vi!	A: Ĉu la vojaĝo estas glata?	A: Ĝis revido!
B: 谢谢。	B: 还可以。	B: 再见!
B: Xièxie.	B: Hái kěyǐ.	B: Zàijiāng
dank-	ankoraŭ bon-	refoje vid-
B: Dankon.	B: Bone.	B: Ĝis revido!

#### Klarigoj

1. 你好 estas salutvorto ofte uzata de la ĉinoj ĉu matene, tagmeze aŭ vespere. Ĝi uziĝas ankaŭ en la unua renkontiĝo. Oni ofte uzas ankaŭ la vorton 您好 (nǐhǎo saluton), 您 estas pli respekta dirmaniero de “你”.

2. 你身体好吗? estas demanda frazo, en kiu la demanda vorto “吗” estas ĉe la fino. Ekzemple: 你好。→你好吗? 他身体好。→他身体好吗?


3. 很好 (tre + adjektivo): Per tiu formulo oni esprimas pli altan gradon. Ĉi tie oni uzas ĝin nur por fari la vorton pliklare aŭdebla.

# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

*Kanguruoj de Aŭstralio*

Fotoj de IRENA CZITRONYI  
(AŬSTRALIO)

*Kanbero*



815W

